

## LA LIBRO DE MOSEO

## ĈAPITRO 1

## VIZIOJ DE MOSEO

Kiel rivelitaj al Jozefo Smith la Profeto en junio 1830.

LA vortoj de Dio, kiujn li parolis al Moseo en tempo, kiam Moseo estis forlevita al treege alta monto,

2 Kaj li vidis Dion, vizaĝon kontraŭ vizaĝo, kaj li parolis kun li, kaj la gloro de Dio estis sur Moseo; pro tio Moseo povis elteni lian ĉeeston.

3 Kaj Dio parolis al Moseo, dirante: Jen, mi estas la Eternulo, la Plejpotenca, kaj Senfina estas mia nomo; ĉar mi estas sen komenco de tagoj aŭ fino de jaroj; kaj ĉu tio ne estas senfina?

4 Kaj, jen, vi estas mia filo; sekve rigardu, kaj mi montros al vi la farojn de miaj manoj; sed ne ĉiujn, ĉar miaj faroj estas senfinaj, kaj ankaŭ miaj vortoj, ĉar ili neniam ĉesas.

5 Pro tio, neniu homo povas vidi ĉiujn el miaj faroj se li ne vidas mian tutan gloron; kaj neniu homo povas vidi mian tutan gloron, kaj poste resti en la karno sur la tero.

6 Kaj mi havas laboron por vi, Moseo, mia filo; kaj vi estas laŭ la bildo de mia Solenaskito; kaj mia Solenaskito estas kaj estos la Savonto, ĉar li estas plena de graco kaj vero; sed ne ekzistas alia dio krom mi, kaj ĉiuj aĵoj ĉeestas ĉe mi, ĉar mi konas ĉiujn el ili.

7. Kaj nun, jen unu afero, kiun mi montru al vi, Moseo, mia filo; ĉar vi estas en la mondo, kaj nun mi montru ĝin al vi.

8 Kaj okazis, ke Moseo rigardis, kaj vidis la mondon, sur kiu li estis kreita; kaj Moseo rigardis la mondon kaj ĝiajn limojn, kaj ĉiujn homidojn kiuj estas, kaj estis, kreitaj; pri tio li ege miris kaj meditis.

9 Kaj Dio foriris de antaŭ Moseo, tiel ke lia gloro ne estis sur Moseo, kaj Moseo estis lasita sola. Kaj, estante lasita sola, li

falis al la tero.

10 Kaj okazis, ke multaj horoj pasis antaŭ ol Moseo denove ricevis sian naturan forton kiel viro; kaj li diris al si: Nun, pro tiu kialo mi scias, ke la homo estas nenio, kiun fakton mi neniam supozis.

11 Sed nun miaj propraj okuloj vidis Dion; sed ne miaj okuloj naturaj, sed miaj okuloj spiritaj, ĉar miaj okuloj naturaj ne povus vidi; ĉar mi sekigis kaj mortus antaŭ li; sed lia gloro estis sur mi; kaj mi vidis lian vizaĝon, ĉar mi estis aliformita antaŭ li.

12 Kaj okazis post kiam Moseo diris ĉi tiujn vortojn, ke jen Satano venis por tenti lin, dirante: Moseo, filo de homo, adoru min.

13 Kaj okazis, ke Moseo rigardis Satanon kaj diris: Kiu estas vi? Ĉar jen mi estas filo de Dio, laŭ la bildo de lia Solenaskito; kaj kie estas via gloro, ke mi adoru vin?

14 Ĉar, komprenu, mi ne povus rigardi Dion se lia gloro ne estus veninta sur min kaj mi ne estus fortigita antaŭ li. Sed mi povas rigardi vin kiel naturan homon. Ĉu tio ne estas vera?

15 Benata estu la nomo de mia Dio, ĉar lia Spirito ne tute foriris de mi, aŭ kie alie estas via gloro, ĉar por mi ĝi estas mallumo? Kaj mi povas juĝi inter vi kaj Dio; ĉar Dio diris al mi: Adoru Dion, ĉar nur lin vi servu.

16 Foriru de ĉi tie, Satano; ne tromplogu min; ĉar Dio diris al mi: Vi estas laŭ la bildo de mia Solenaskito.

17 Kaj li ankaŭ donis al mi ordonojn, kiam li vokis al mi el la flamanta arbeto, dirante: Voku al Dio en la nomo de mia Solenaskito, kaj adoru min.

18 Kaj denove Moseo diris: mi ne ĉeso voki al Dio, mi havas aliajn aferojn por demandi al li: ĉar lia gloro estis sur mi, pro tio mi povas juĝi inter li kaj vi. Foriru de ĉi tie, Satano.

19 Kaj, kiam Moseo diris tiujn vortojn, Satano ekkriis per laŭta voĉo, kaj ŝire resonis sur la tero, kaj ordonis, dirante: mi estas la Solenaskito, adoru min.

20 Kaj okazis, ke Moseo ektimegis; kaj, ektimante, li vidis la amarecon de la

infero. Tamen, vokinte la nomon de Dio, li ricevis forton, kaj li ordonis, dirante: Foriru de mi, Satano, ĉar mi adoras nur ĉi tiun unikan Dion, kiu estas la Dio de la gloro.

21 Kaj nun Satano ekstrems, kaj la tero skuiĝis; kaj Moseo ricevis forton, kaj vokis al Dio, dirante: En la nomo de la Solenaskito, foriru de ĉi tie, Satano.

22 Kaj okazis, ke Satano ekkriis per laŭta voĉo, kun plorado, kaj veado, kaj grincado de dentoj; kaj li foriris de tie, eĉ de antaŭ Moseo, tiel ke li jam ne vidis lin.

23 Kaj nun pri ĉi tiu afero Moseo atestis; sed pro la malboneco la atesto ne troviĝas inter la homidoj.

24 Kaj okazis, kiam Satano foriris de antaŭ Moseo, ke Moseo levis siajn okulojn al la ĉielo, plenigite per la Sankta Spirito, kiu atestas pri la Patro kaj la Filo;

25 Kaj vokante la nomon de Dio, li revidis lian gloron, ĉar ĝi estis sur li; kaj li aŭdis voĉon, kiu diris: Benita estas vi, Moseo, ĉar mi, la Plejpotenca, elektis vin, kaj vi estos farita pli forta ol multaj akvoj; ĉar ili obeos vian ordonon kvazaŭ vi estus Dio.

26 Kaj, jen, mi estas kun vi, eĉ ĝis la fino de viaj tagoj; ĉar vi liberigos el la sklaveco mian popolon, eĉ Izraelon, mian elektiton.

27 Kaj okazis, dum la voĉo ankoraŭ parolis, ke Moseo etis sian rigardon kaj vidis la teron, jes, eĉ la tutan teron; kaj ne estis ereto de ĝi, kiun li ne vidis, distingante ĝin per la Spirito de Dio.

28 Kaj li vidis ankaŭ ĝiajn loĝantojn, kaj ne estis animo, kiun li ne vidis; kaj li distingis ilin per la Spirito de Dio; kaj ilia nombro estis granda, eĉ nenombrebla kiel la sablo sur la bordo de la maro.

29 Kaj li vidis multajn landojn; kaj ĉiu lando estis nomita tero, kaj havis loĝantojn sur sia supraĵo.

30 Kaj okazis, ke Moseo vokis al Dio, dirante: Diru al mi, mi petas vin, kial ĉi tiuj aĵoj estas tiaj, kaj per kio vi faris ilin?

31 Kaj jen, la gloro de la Eternulo estis sur Moseo, tiel ke Moseo staris antaŭ Dio, kaj parolis kun li vizaĝon kontraŭ vizaĝo. Kaj la

Eternulo diris al Moseo: Por mia propra intenco mi faris ĉi tiujn aĵojn. Jen estas la saĝo kaj ĝi restas en mi.

32 Kaj mi kreis ilin per la vorto de mia potenco, kiu estas mia Solenaskito, kiu estas plena de graco kaj vero.

33 Kaj nenombreblajn mondojn mi kreis; kaj mi kreis ilin ankaŭ por mia propra intenco; kaj mi kreis ilin per la Filo, kiu estas mia Solenaskito.

34 Kaj la unuan homon el ĉiuj homoj mi nomis Adam, kio estas multaj.

35 Sed nur raporton pri ĉi tiu tero, kaj ĝiaj loĝantoj, mi donas al vi. Ĉar, sciu, ke multaj mondoj forpasis pro la vorto de mia potenco. Kaj multaj ankoraŭ restas, kaj ili estas nenombreblaj por homo; sed ĉiuj aĵoj estas nombreblaj por mi, ĉar ili estas miaj kaj mi konas ilin.

36 Kaj okazis, ke Moseo parolis al la Eternulo, dirante: Korfavoru vian servanton, ho Dio, kaj rakontu al mi pri ĉi tiu tero, kaj ĝiaj loĝantoj, kaj ankaŭ la ĉielo, kaj poste via servanto estos kontenta.

37 Kaj la Eternulo parolis al Moseo, dirante: La ĉielo, ili estas multaj, kaj ili estas nenombreblaj por la homo; sed ili estas nombreblaj por mi, ĉar ili estas miaj.

38 Kaj, kiam unu tero forpasos, kaj ĝia ĉielo, alvenos alia; kaj miaj verkoj ne havas finon, kaj ankaŭ ne miaj vortoj.

39 Ĉar jen, ĉi tio estas mia laboro kaj mia gloro--efektivigi la senmortecon kaj eternan vivon de la homo.

40 Kaj nun, Moseo, mia filo, mi parolos al vi pri ĉi tiu tero sur kiu vi staras; kaj vi skribu tion, kion mi parolos.

41 Kaj iun tagon, kiam la homidoj taksos miajn vortojn kiel nulon kaj elprenos multajn el ili el la libro, kiun vi skribos, jen mi estigos alian similan al vi; kaj ili estos haveblaj denove inter la homidoj--inter ĉiuj, kiuj kredos.

42 (Ĉi tiuj vortoj estis parolitaj al Moseo sur la Monto, kies nomo ne estas konata de la homidoj. Kaj nun ili estas parolataj al vi. Ne montru ilin al iu krom al tiuj, kiuj kredas. Eĉ tiel. Amen.)

## ĈAPITRO 2

## LA SKRIBOJ DE MOSEO

Kiel rivelitaj al Jozefo Smith la Profeto en decembro 1830.

KAJ Okazis, ke la Eternulo parolis al Moseo, dirante: Jen, mi rivelas al vi pri ĉi tiu ĉielo, kaj ĉi tiu tero; skribu la vortojn, kiujn mi parolas. Mi estas la Komenco kaj la Fino, la Eternulo Plejpotenca; per mia Solenaskito mi kreis ĉi tiujn aĵojn; jes, en la komenco mi kreis la ĉielon, kaj la teron sur kiu vi staras.

2 Kaj la tero estis senforma kaj dezerta; kaj mi venigis mallumon super la abismon; kaj mia Spirito ŝvebis super la akvo; ĉar mi estas Dio.

3 Kaj mi, Dio, diris: Estu lumo; kaj fariĝis lumo.

4 Kaj mi, Dio, vidis la lumon; kaj ke la lumo estas bona.

5 Kaj mi, dio, nomis la lumon Tago; kaj la mallumon mi nomis Nokto; kaj tion mi faris per la vorto de mia potenco, kaj tio estis farata dum mi parolis; kaj estis vespero, kaj estis mateno, unu tago.

6 Kaj mi, Dio, plue diris: Estu firmaĵo inter la akvo, kaj fariĝis tiel, eĉ dum mi parolis; kaj mi diris: Ĝi apartigu akvon de akvo; kaj tio fariĝis;

7 Kaj mi, Dio, kreis la firmaĵon kaj apartigis la akvon, jes, la grandan akvon sub la firmaĵo de la akvo, kiu estas super la firmaĵo, kaj fariĝis tiel, eĉ dum mi parolis.

8 Kaj mi, Dio, nomis la firmaĵon Ĉielo; kaj estis vespero, kaj estis mateno, la dua tago.

9 Kaj mi, Dio, diris: Kolektiĝu la akvo de sub la ĉielo en unu lokon, kaj fariĝis tiel; kaj mi, Dio, diris: Estu sekaĵo; kaj fariĝis tiel.

10 Kaj mi, Dio, nomis la sekaĵon Tero; kaj la kolektiĝojn de la akvo mi nomis la Maro; kaj mi, Dio, vidis, ke ĉio, kion mi faris, estas bona.

11 Kaj mi, Dio, diris: Kreskigu la tero verdaĵon, herbon, kiu naskas semon, fruktarbon, kiu donas laŭ sia speco frukton,

kaj arbon, kiu donas frukton, kies semo estas en ĝi mem sur la tero, kaj fariĝis tiel dum mi parolis.

12 Kaj la tero elkreskigis verdaĵon, herbon, kiu naskas semon laŭ sia speco, kaj arbon, kiu donas frukton, kies semo estas en ĝi mem laŭ sia speco; kaj mi, Dio, vidis, ke ĉio, kion mi faris, estas bona;

13 Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la tria tago.

14 Kaj mi, Dio, diris: Estu lumaĵoj en la ĉielo firmaĵo, por apartigi la tagon de la nokto, kaj ili prezentu signojn, tempojn, tagojn, kaj jarojn;

15 Kaj ili estu lumaĵoj en la ĉielo firmaĵo, por lumi super la tero; kaj fariĝis tiel.

16 Kaj mi, Dio, faris la du grandajn lumaĵojn; la pli grandan lumaĵon, por regi la tagon, kaj la malpli grandan lumaĵon, por regi la nokton, kaj la pli granda lumaĵo estis la suno, kaj la malpli granda lumaĵo estis la luno; kaj ankaŭ fariĝis la steloj eĉ laŭ mia vorto.

17 Kaj mi, Dio, starigis ilin sur la ĉiela firmaĵo, por ke ili lumu sur la teron,

18 Kaj la sunon, por regi la tagon, kaj la lumon, por regi la nokton, kaj por fari diferencon inter la lumo kaj la mallumo; kaj mi, Dio, vidis, ke ĉio, kion mi faris, estas bona;

19 Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la kvara tago.

20 Kaj mi, Dio, diris: La akvo aperigu moviĝantaĵojn, vivajn estaĵojn, kaj birdoj ekflugu super la tero, sub la ĉiela firmaĵo.

21 Kaj mi, Dio, kreis la grandajn balenojn, kaj ĉiujn vivajn estaĵojn moviĝantajn kiujn aperigis la akvo, laŭ ilia speco, kaj ĉiujn flugilhavajn birdojn, laŭ ilia speco; kaj mi, Dio, vidis, ke ĉio, kion mi kreis, estas bona.

22 Kaj mi, Dio, ilin benis, dirante: Fruktu kaj multiĝu, kaj plenu la akvon en la maroj, kaj la birdoj multiĝu sur la tero;

23 Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la kvina tago.

24 Kaj mi, Dio, diris: La tero aperigu

vivajn estaĵojn, laŭ ilia speco, brutojn kaj rampaĵojn kaj surterajn bestojn, laŭ ilia speco; kaj fariĝis tiel.

25 Kaj mi, Dio, kreis la bestojn de la tero, laŭ ilia speco, kaj la brutojn, laŭ ilia speco, kaj ĉiujn rampaĵojn de la tero, laŭ ilia speco; kaj mi, Dio, vidis, ke ĉiuj tiuj estas bonaj.

26 Kaj mi, Dio, diris al mia Solenaskito, kiu estis kun mi de la komenco: Ni kreu homon laŭ nia bildo, similan al ni; kaj fariĝis tiel. Kaj mi, Dio, diris: Ili regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj de la ĉielo kaj super la brutoj, kaj super la tuta tero, kaj super ĉiuj rampaĵoj, kiuj rampas sur la tero.

Kaj mi, Dio, kreis la homon laŭ mia bildo, laŭ la bildo de mia Solenaskito mi kreis lin; en formo de viro kaj virino mi kreis ilin.

28 Kaj mi, Dio, benis ilin, kaj diris al ili: Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la teron kaj submetu ĝin al vi, kaj regu super la fiŝoj de la maro, kaj super la birdoj de la ĉielo, kaj super ĉiuj bestoj, kiuj moviĝas sur la tero.

29 Kaj mi, Dio, diris al la homo: Jen mi donis al vi ĉiujn herbojn, kiuj semas semon, kiuj troviĝas sur tuta tero, kaj ĉiujn arbojn, kiuj havas en si arban frukton, kiu semas semon; tio estu por vi manĝaĵo.

30 Kaj al ĉiuj bestoj de la tero kaj al ĉiuj birdoj de la ĉielo kaj al ĉiuj rampaĵoj sur la tero, al kiuj mi donis vivon, estu donita la tuta pura herbaĵo kiel manĝaĵo; kaj fariĝis tiel, eĉ kiel mi diris.

31 Kaj mi, Dio, rigardis ĉion, kion mi kreis, kaj vidis, ke ĉio, kion mi kreis, estas tre bona; kaj estis vespero, kaj estis mateno, la sesa tago.

### ĈAPITRO 3

#### LA SKRIBOJ DE MOSEO

Kiel rivelitaj al Jozefo Smith la Profeto en decembro 1830--Daŭrigo.

KAJ estis finitaj la ĉielo kaj la tero kaj ĉiuj iliaj apartenaĵoj.

2 Kaj en la sepa tago mi, Dio, finis mian laboron, kaj ĉion, kion mi faris; kaj mi ripozis en la sepa tago de la tuta laboro, kaj ĉio, kion mi faris, estis finita, kaj mi, Dio, vidis, ke ĝi estas bona;

3 Kaj mi, Dio, benis la sepan tagon, kaj sanktigis ĝin; ĉar en ĝi mi ripozis de mia tuta laboro, kiun mi, Dio, faris kreante.

4 Kaj nun, jen mi diras al vi, ke tia estas la naskiĝo de la ĉielo kaj la tero, kiam ili estis kreitaj, en la tago kiam mi, la Eternulo, faris la ĉielon kaj la teron;

5 Kaj nenia kampa arbeto ankoraŭ estis sur la tero, kaj nenia kampa herbo ankoraŭ kreskis. Ĉar mi, la Eternulo, spirite kreis ĉion, pri kio mi parolis, antaŭ ol ĝi estis fizike sur la tero. Ĉar mi, la Eternulo, ne pluvigis sur la teron. Kaj mi, la Eternulo, jam kreis ĉiujn homidojn; kaj ankoraŭ ne homon, por prilabori la teron; ĉar en la ĉielo mi kreis ilin; kaj ankoraŭ ne estis karno sur la tero, nek en la akvo, nek en la aero;

6 Sed mi, la Eternulo, parolis, kaj nebulo levigadis de la tero kaj donadis malsekecon al la tuta supraĵo de la tero,

7 Kaj mi, la Eternulo, kreis la homon el polvo de la tero, kaj enblovis en lian nazon spiron de vivo, kaj la homo fariĝis viva animo, la unua karno sur la tero, ankaŭ la unua homo; tamen, ĉio estis antaŭe kreita; sed ĝi estis spirite kreita kaj farita laŭ mia vorto.

8 Kaj mi, la Eternulo, plantis ĝardenon en Eden en la Oriento, kaj mi metis tien la homon, kiun mi kreis.

9 Kaj el la tero mi, la Eternulo, fizike elkreskigis ĉiun arbon ĉarman por la vido de la homo; kaj la homo povis vidi ĝin. Kaj ankaŭ ĝi fariĝis viva animo. Ĉar ĝi estis spirito, kiam mi kreis ĝin; ĉar ĝi restas en la sfero en kiu mi, Dio, kreis ĝin, jes, eĉ ĉion, kion mi preparis por la homa uzo; kaj la homo vidis, ke ĝi estas bona por la manĝo. Kaj mi, la Eternulo, plantis ankaŭ la arbon de vivo en la mezo de la ĝardeno, kaj ankaŭ la arbon de sciado pri bono kaj malbono.

10 Kaj mi, la Eternulo, elirigis riveron el Eden, por akvoprovizi la ĝardenon; kaj de tie ĝi dividiĝis kaj fariĝis kvar ĉefbrakoj.

11 Kaj mi, la Eternulo, donis al la unua la nomon Piŝon, kaj ĝi ĉirkaŭas la tutan landon Ĥavila, kie mi, la Eternulo, kreis multe da oro;

12 Kaj la oro de tiu lando estis bona, kaj tie troviĝis bedelio kaj la ŝtono onikso.

13 Kaj la dua rivero estis nomita Giĥon; ĝi estas tiu, kiu ĉirkaŭas la tutan landon Etiopujo.

14 Kaj la nomo de la tria rivero estis Ĥidekel; ĝi estas tiu, kiu fluas al la oriento de Asirio. Kaj la kvara rivero estis Eŭfrato.

15 Kaj mi, la Eternulo, prenis la homon kaj enloĝigis lin en la ĝardeno Edena, por ke li prilaboradu ĝin kaj gardu ĝin.

16 Kaj mi, la Eternulo, ordonis al la homo, dirante: De ĉiu arbo de la ĝardeno vi manĝu.

17 Sed de la arbo de sciado pri bono kaj malbono vi ne manĝu, tamen vi mem elektu, ĉar al vi estas donite; sed memoru, ke mi malpermesas tion, ĉar en la tago, en kiu vi manĝos de ĝi, vi mortos.

18 Kaj mi, la Eternulo, diris al mia Solenaskito, ke ne estas bona, ke la homo estu sola; sekve mi kreos al li helpanton similan al li.

19 Kaj mi, la Eternulo, kreis el la tero ĉiujn bestojn de la kampo kaj ĉiujn birdojn de la ĉielo; kaj ordonis, ke ili venu al Adam, por vidi, kiel li nomos ilin; kaj ankaŭ ili estis vivaj animoj; ĉar mi, Dio, enblovis en ilin spiron de vivo, kaj ordonis, ke, kiel Adam nomis ĉiun vivan estaĵon, tiel restu ĝia nomo.

20 Kaj Adam donis nomojn al ĉiuj brutoj kaj al la birdoj de la ĉielo kaj al ĉiuj bestoj de la kampo; sed por Adam ne troviĝis helpanto simila al li.

21 Kaj mi, la Eternulo, faligis profundan dormon sur Adamon; kaj li endormiĝis, kaj mi prenis unu el liaj ripoj kaj fermis la lokon per karno;

22 Kaj mi, la Eternulo, konstruis el la ripo, kiun mi prenis de la homo, virinon, kaj mi venigis ŝin al la homo.

23 Kaj Adam diris: Jen nun mi scias, ke ŝi estas osto el miaj ostoj kaj karno el mia karno; ŝi estu nomata Virino, ĉar el Viro ŝi

estas prenita.

24 Tial viro forlasos sian patron kaj sian patrinon, kaj aliĝos al sia edzino, kaj ili estos unu karno.

25 Kaj ili ambaŭ estis nudaj, la homo kaj lia edzino, kaj ili ne hontis.

## ĈAPITRO 4

### LA SKRIBOJ DE MOSEO

Kiel rivelitaj al Jozefo Smith la Profeto en decembro 1830--Daŭrigo.

KAJ mi, la Eternulo, parolis al Moseo, dirante: Tiu Satano, al kiu vi ordonis en la nomo de mia Solenaskito, estas tiu, kiu estis de la komenco, kaj li venis antaŭ min, dirante: Jen ĉi tie mi; sendu min; mi estos via folo, kaj mi savos la tutan homaron, tiel ke ne unu animo estos perdita, kaj mi certe faros tion; pro tio donu al mi vian gloron.

2 Sed, jen, mia Filo, la Amata, kiu estis mia Amato kaj Elektito de la komenco, diris al mi: Patro, plenumiĝu via volo, kaj la gloro estu via por eterne.

3 Sekve, pro tio, ke Satano ribelis kontraŭ mi, kaj volis detrui la libervolan agpovon de la homo, kiun mi, la Eternulo, donis al li, kaj ankaŭ ke mi donu al li mian propran potencon; per la potenco de mia Solenaskito mi faligis lin;

4 Kaj li fariĝis Satano, jes, eĉ la diablo, la patro de ĉiuj mensogoj, por trompi kaj blindigi la homojn, kaj por konduki ilin por plenumi sian volon kiel kaptitojn, eĉ ĉiujn el tiuj, kiuj ne volis aŭskulti mian voĉon.

5 Kaj la serpento estis pli ruza, ol ĉiuj kampaj bestoj, kiujn kreis mi, la Eternulo.

6 Kaj Satano incitis la koron de la serpento, (ĉar li forlogis multajn post si), kaj li volis ankaŭ tromplogi Evan, ĉar li ne konis la intencon de Dio, kaj sekve li provis detrui la mondon.

7 Kaj li diris al la virino: Ĉu Dio diris, ke vi ne manĝu de ĉiuj arboj de la ĝardeno? (Kaj li parolis per la buŝo de la serpento.)

8 Kaj la virino diris al la serpento: La

fruktojn de la arboj de la ĝardeno ni povas manĝi;

9 Sed pri la Fruktoj de la arbo, kiu estas en la mezo de la ĝardeno, Dio diris: Ne manĝu ion de ili kaj ne tuŝu ilin, por ke vi ne mortu.

10 Kaj la serpento diris al la virino: Ne, vi ne mortos;

11 Sed Dio scias, ke en la tago, en kiu vi manĝos ion de ili, malfermiĝos viaj okuloj kaj vi estos kiel Dio, vi scios bonon kaj malbonon.

12 Kaj la virino vidis, ke la arbo estas bona por manĝi kaj ĝi fariĝis ĉarma por la okuloj, kaj la arbo estas dezirinda por saĝigi ŝin; kaj ŝi prenis de ĝiaj fruktoj, kaj ŝi manĝis, kaj ŝi donis kune ankaŭ al sia edzo, kaj li manĝis.

13 Kaj malfermiĝis la okuloj de ili ambaŭ, kaj ili sciiĝis, ke ili estis nudaj. Kaj ili kunkudris foliojn de figarbo kaj faris al si zonojn.

14 Kaj ili aŭdis la voĉon de Dio la Eternulo, marŝante en la ĝardeno dum la malvarmeto de la tago; kaj Adam kaj lia edzino foriris por kaŝiĝi de Dio la Eternulo inter la arboj de la ĝardeno.

15 Kaj mi, la Eternulo, vokis Adamon, kaj diris al li: Kien vi iras?

16 Kaj tiu diris: Vian voĉon mi aŭdis en la ĝardeno, kaj mi ektimis, ĉar mi vidis, ke mi estis nuda, kaj mi kaŝis min.

17 Kaj mi, la Eternulo, diris al Adam: Kiu diris al vi, ke vi estas nuda? Ĉu vi ne manĝis de la arbo, pri kiu mi ordonis al vi, ke vi ne manĝu de ĝi; ke, manĝinte, vi certe mortos?

18 Kaj la viro diris: La virino, kiun vi donis al mi, kaj ordonis, ke ŝi restu kun mi, ŝi donis al mi de la frukto de la arbo, kaj mi manĝis.

19 Kaj mi, la Eternulo, diris al la virino: Kial vi tion faris? Kaj la virino diris: La serpento tromplogis min, kaj mi manĝis.

10 Kaj mi, la Eternulo, diris al la serpento: Ĉar vi tion faris, tial vi estos malbenita inter ĉiuj brutoj kaj inter ĉiuj bestoj de la kampo; sur via ventro vi irados kaj teron

vi manĝados dum via tuta vivo;

21 Kaj mi metos malamikecon inter vi kaj la virino kaj inter via idaro kaj ŝia idaro; ĝi frapados vian kapon, kaj vi pikados ĝian kalkanon.

22 Al la virino mi, la Eternulo, diris: Mi multigos viajn suferojn dum via gravedeco. En doloro vi naskados infanojn; kaj al via viro vi vin tiros, kaj li regos super vi.

23 Kaj al Adam mi, la Eternulo, diris: Ĉar vi obeis la voĉon de via edzino, kaj vi manĝis de la frukto de la arbo, pri kiu mi ordonis al vi, dirante, ke vi ne manĝu de ĝi, tial malbenita estos la tero pro vi; kun suferoj vi manĝados de ĝi dum via tuta vivo.

24 Kaj dornojn kaj pikaĵojn ĝi kreskigos por vi, kaj vi manĝados herbojn de kampo.

25 Per la ŝvito de via vizaĝo vi manĝados panon, ĝis vi revenos en la teron--ĉar vi nepre mortos--ĉar el ĝi vi estis prenita: ĉar vi estis polvo kaj refariĝos polvo.

26 Kaj Adam donis al sia edzino la nomon Eva, ĉar ŝi estis patrino de ĉiuj vivantoj; ĉar tiel mi, la Eternulo, nomis la unuan el ĉiuj virinoj, kiuj estas multaj.

27 Kaj mi, la Eternulo, faris por Adam kaj ankaŭ por lia edzino vestojn el felo, kaj mi vestis ilin.

28 Kaj mi, la Eternulo, diris al mia Solenaskito: Jen la homo fariĝis kiel unu el ni, sciante bonon kaj malbonon; nun eble li etendos sian manon kaj prenos ankaŭ de la arbo de vivo, kaj manĝos kaj vivos eterne.

29 Pro tio mi, la Eternulo, eligos lin el la Edena ĝardeno, por ke li prilaboradu la teron, el kiu li estis prenita.

30 Ĉar, kiel mi, la Eternulo, vivas, eĉ tiel miaj vortoj ne revenos al mi vane, ĉar, elirante el mia buŝo, ili devas plenumiĝi.

31 Mi do elpelis la homon, kaj mi lokis oriente antaŭ la Edena ĝardeno kerubon kaj turniĝantan flaman glavon, por gardi la vojon al la arbo de vivo.

32 (Kaj tiaj estas la vortoj, kiujn mi parolis al mia servanto Moseo, kaj ili estas veraj eĉ kiel mi deziras; kaj mi diris ilin al vi.

Zorgu, ke vi montru ilin al neniuj ĝis mi ordonos vin, krom al tiuj, kiuj kredas. Amen.)

## ĈAPITRO 5

### LA SKRIBOJ DE MOSEO

Kiel rivelitaj al Jozefo Smith la Profeto en decembro 1830--Daŭrigo.

KAJ okazis, post kiam mi, la Eternulo, elpelis ilin, ke Adam komencis prilaboradi la teron, kaj regi super ĉiuj bestoj de la kampo, kaj manĝadi sian panon sub la ŝvito de sia frunto, kiel mi, la Eternulo, ordonis al li. Kaj ankaŭ Eva, lia edzino, laboradis kun li.

2 Kaj Adam ekkonis sian edzinon, kaj ŝi naskis al li filojn kaj filinojn, kaj ili komencis multiĝi kaj plenigi la teron.

3 Kaj ekde tiu tempo la filoj kaj filinoj de Adam komencis disiri duope tra la lando, kaj prilaboradi la teron, kaj paŝti ŝafarojn, kaj ankaŭ al ili naskiĝis filoj kaj filinoj.

4 Kaj Adam kaj Eva, lia edzino, vokis je la nomo de al Eternulo, kaj de la vojo al la Edena ĝardeno ili aŭdis la voĉon de la Eternulo parolantan al ili, sed ili ne vidis lin; ĉar ili estis elbaritaj de antaŭ li.

5 Kaj li donis al ili ordonojn, ke ili adoru la Eternulon kaj oferu la unuenaskitojn de siaj ŝafoj kiel donacoferon al la Eternulo. Kaj Adam obeis la ordonojn de la Eternulo.

6 Kaj post multaj tagoj anĝelo de la Eternulo aperis al Adam, dirante: Kial vi alportas oferojn al la Eternulo? Kaj Adam diris al li: Mi ne scias, krom ke la Eternulo ordonis min.

7 Kaj la anĝelo parolis, dirante: Tio ĉi estas bildo de la ofero de la Solenaskito de la Patro, kiu estas plena de graco kaj vero.

8 Pro tio, vi devos fari ĉion, kion vi faras, en la nomo de la Filo, kaj vi devos penti kaj voki al Dio en la nomo de la Filo por eterne.

9 Kaj en tiu tago la Sankta Spirito, kiu portas ateston de la Patro kaj Filo, falis sur Adamon, dirante: Mi estas la Solenaskito de la

Patro de la komenco, de nun kaj por eterne, por ke, kvankam vi falis, vi tamen povos esti savita, kaj la tuta homaro, eĉ ĉiuj, kiuj deziras.

10 Kaj en tiu tago Adam benis Dion kaj inspiraĝis, kaj komencis profeti pri ĉiuj familioj de la tero, dirante: La nomo de la Eternulo estu benata, ĉar pro mia leĝorompo miaj okuloj estas malfermitaj, kaj en ĉi tiu vivo mi havos ĝojon, kaj denove mi fidos Dion en la karno.

11 Kaj Eva, lia edzino, aŭdis ĉion ĉi kaj ekĝojis, dirante: Se ni ne estus rompintaj la leĝon, ni neniam havus idaron, kaj neniam sciis bonon kaj malbonon, kaj la ĝojon de nia saviĝo, kaj la eternan vivon, kiun Dio donas al ĉiuj obeantoj.

12 Kaj Adam kaj Eva benis la nomon de Dio, kaj ili konigis ĉion al siaj filoj kaj siaj filinoj.

13 Kaj Satano venis inter ilin, dirante: Ankaŭ mi estas filo de Dio; kaj li ordonis al ili, dirante: Ne kredu tion; kaj ili ne kredis ĝin, kaj ili amis Satanon pli ol Dion. Kaj la homoj ekde tiu tempo fariĝis karnaj, laŭsentaj kaj demonaj.

14 Kaj la Eternulo vokis al la homoj ĉie per la Sankta Spirito kaj ordonis al ili, ke ili pentu;

15 Kaj ĉiuj, kiuj kredas al la Filo kaj pentas pri siaj pekoj, estos savitaj; kaj ĉiuj, kiuj ne kredas kaj ne pentas, estos kondamnitaj; kaj la vortoj eliris el la buŝo de Dio kiel firma dekreto; sekve ili devas esti plenumitaj.

16 Kaj Adam kaj Eva, lia edzino, ne ĉesis voki al Dio. Kaj Adam ekkonis Evan, sian edzinon, kaj ŝi gravediĝis kaj naskis Kainon, kaj diris: Ni akiris homon de la Eternulo; pro tio li eble ne malakceptos liajn vortojn. Sed jen Kian ne s'aŭskultis, dirante: Kiu estas la Eternulo, ke mi devu koni lin?

17 Kaj ŝi denove gravediĝis kaj naskis lian fraton Habel. Kaj Habel aŭskultis la voĉon de la Eternulo. Kaj Habel fariĝis ŝafpaŝtisto, sed Kain fariĝis terlaboristo.

18 Kaj Kian amis Satanon pli ol Dion. Kaj Satano ordonis al li, dirante: Faru donacoferon al la Eternulo.

19 Kaj post ia tempo fariĝis, ke Kian alportis el la fruktoj de la tero donacoferon al la Eternulo.

20 Kaj ankaŭ Habel elportis el la unuenaskitoj de siaj ŝafoj kaj el ilia graso. Kaj la Eternulo atentis Habelon kaj lian donacoferon.

21 Sed Kainon kaj lian donacoferon li ne atentis. Satano sciis tion, kaj tio plaĉis al li. Kaj Kian tre ekkoleris, kaj lia vizaĝo kliniĝis.

22 Kaj la Eternulo diris al Kain: Kial vi koleras? kaj kial kliniĝis via vizaĝo?

23 Ja, se vi agos bone, vi estos forta. Sed, se vi agos malbone, la peko kuŝos ĉe la pordo, kaj Satano deziras havi vin; kaj, se vi ne aŭskultos miajn ordonojn, mi transdonos vin, kaj okazos al vi laŭ lia deziro. Kaj vi regos super li;

24 Ĉar ekde nun vi estos la patro de liaj mensogoj; vi estos nomita Perdiĝo; ĉar vi estis ankaŭ antaŭ la mondo.

25 Kaj oni diros en la venonta tempo: Ke tiuj abomenaĵoj venis de Kain; ĉar li malakceptis la pli superan konsilon, kiu venis de Dio; kaj ĉi tio estas malbeno, kiun mi metos sur vin, se vi ne pentos.

26 Kaj Kain ekkoleris, kaj jam ne aŭskultis al la voĉo de la Eternulo, nek al Habel, lia frato, kiu iris en sankteco antaŭ la Eternulo.

27 Kaj Adam kaj lia edzino afliktiĝis antaŭ la Eternulo, pro Kain kaj liaj fratoj.

28 Kaj okazis, ke Kain prenis al si unu el la filinoj de siaj fratoj kiel edzinon, kaj ili amis Satanon pli ol Dion.

29 Kaj Satano diris al Kain: ĵuru al mi per via gorĝo, kaj se vi malkaŝos vi mortos: kaj ĵurigu viajn fratojn per iliaj kapoj, kaj per la vivanta Dio, ke ili ne malkaŝos; ĉar, se ili malkaŝos, ili certe mortos: kaj tiel por ke via patro ne sciu; kaj hodiaŭ mi donos vian fraton Habel en viajn manojn.

30 Kaj Satano ĵuris al Kain, ke li faros laŭ liaj ordonoj. Kaj ĉio ĉi estis sekrete farita.

31 Kaj Kain diris: Certe mi estas Mahan, mastro de ĉi tiu granda sekreto, ke mi povas murdi kaj profiti. Pro tio Kain estis

nomita Mastro Mahan, kaj li fieris pri sia malboneco.

32 Kaj Kain iris sur la kampon, kaj Kain parolis kun sia frato Habel. Kaj, kiam ili estis sur la kampo, Kain leviĝis kontraŭ sian fraton Habel kaj mortigis lin.

33 Kaj Kain sin gloris pri tio, kion li faris, dirante: Mi estas libera; la ŝafaroj de mia frato certe venos en miajn manojn.

34 Kaj la Eternulo diris al Kain: Kie estas via frato Habel? Kaj tiu diris: Mi ne scias. Ĉu mi estas gardisto de mia frato?

35 Kaj la Eternulo diris: Kion vi faris? La voĉo de la sango de via frato krias al mi de la tero.

36 Kaj nun vi estos malbenita de sur la tero, kiu malfermis sian buŝon, por preni la sangon de via frato el via mano.

37 Kiam vi prilaboros la teron, ĝi ne plu donos al vi sian forton. Vaganto kaj forkuranto vi estos sur la tero.

38 Kaj Kian diris al la Eternulo: Satano tentis min pro la ŝafaroj de mia frato. Kaj mi ankaŭ koleriĝis; ĉar lian donacoferon vi akceptis, sed ne mian; pli granda estas mia puno, ol kion mi povos elporti.

51 Ĉar ekde la tagoj de Kain ekzistis sekreta komploto, kaj iliaj faroj estis en la mallumo, kaj ĉiu el ili konis sian fraton.

52 Pro tio la Eternulo malbenis Lemehon, kaj lian domon, kaj ĉiujn, kiuj havis interligon kun Satano; ĉar ili ne obeis la ordonojn de Dio, kaj tio malplaĉis al Dio, kaj li ĉesis konsili ilin, kaj iliaj faroj estis abomenaĵoj kaj komencis disvastiĝi inter la homidoj.

53 Kaj tio estis inter la homidoj, kaj inter la homidinoj oni ne parolis pri tiuj faroj, ĉar Lemeh diris la sekreton al siaj edzinoj, kaj ili ribelis kontraŭ li, kaj disigis la scion, sen kompatio;

54 Pro tio oni malestimis Lemehon kaj elektis lin, kaj li ne venis inter la homidojn por ke li ne mortu.

55 Kaj tiamaniere la faroj de la mallumo komencis superforti inter ĉiuj homidoj.

56 Kaj Dio malbenis la teron per terura



malbeno, kaj koleris kontraŭ la malbonuloj, kontraŭ ĉiuj homidoj, kiujn li kreis.

57 Ĉar ili ne volis aŭskulti lian voĉon, nek kredi al lia Solenaskita Filo, kiu laŭ lia deklaro alvenos, kiam la tempo estos plej favora, kiu estis pretigita antaŭ la kreo de la mondo.

58 Kaj tial la Evangelio komencis esti predikata, de la komenco, estante proklamata de sanktaj anĝeloj dissenditaj de antaŭ Dio, kaj per lia propra voĉo, kaj per la graco de la Sankta Spirito.

59 Kaj tiel ĉio estis konfirmita al Adam, per sankta leĝo, kaj la Evangelio estis predikata, kaj dekreto estis dissendita, ke tio estu en la mondo, ĝis ĝia fino; kaj tiel estis. Amen.

## ĈAPITRO 6

### LA SKRIBOJ DE MOSEO

Kiel rivelitaj al Jozefo Smith la Profeto en decembro 1830--Daŭrigo.

KAJ Adam aŭskultis al la voĉo de Dio, kaj vokis al siaj filoj, ke ili pentu.

2 Kaj denove Adam ekkonis sian edzinon, kaj ŝi naskis filon, kaj li donis al li la nomon Set. Kaj Adam gloris la nomon de Dio; ĉar li diris: Dio metis al mi alian semon anstataŭ Habel, kiun mortigis Kain.

3 Kaj Dio rivelis sin al Set, kaj li ne ribelis, sed alportis akceptindan donacoferon, simile al lia frato Habel. Kaj al li ankaŭ naskiĝis filo, kaj li donis al li la nomon Enoŝ.

4 Kaj tiam ĉi tiuj homoj komencis alvokadi la nomon de la Eternulo, kaj la Eternulo benis ilin;

5 Kaj oni ekkonservis memorlibron, en kiu oni skribis, per la lingvo de Adam, ĉar oni donis ĝin al ĉiuj, kiuj vokis al Dio, por skribi per spirito de inspirigo;

6 Kaj ili instruis al siaj infanoj legi kaj skribi, havante lingvon, kiu estis pura kaj nekoruptita.

7 Nun ĉi tiu sama Pastreco, kiu estis en

la komenco, estos ankaŭ en la fino de la mondo.

8 Adam diris ĉi tiun profetaĵon, emociate de la Sankta Spirito, kaj oni daŭrigis genealogian registron pri la infanoj de Dio. Kaj tiu estis la libro de naskoj de Adam, kiu diris: Kiam Dio kreis la homon, li faris lin laŭ la bildo de Dio;

9 Laŭ la bildo de sia propra korpo, kiel viron kaj virinon li kreis ilin, kaj benis ilin, kaj donis al ili la nomon Homo en la tago de ilia naskiĝo, kiam ili fariĝis vivaj animoj en la lando sur la piedbenketo de Dio.

10 Kaj Adam vivis cent tridek jarojn, kaj al li naskiĝis filo laŭ lia bildo kaj simileco, kaj li donis al li la nomon Set.

11 Kaj Adam vivis, post kiam naskiĝis al li Set, okcent jarojn, kaj naskiĝis al li multaj filoj kaj filinoj;

12 Kaj la tuta vivo, kiun travivis Adam, estis naŭcent tridek jaroj, kaj li mortis.

13 Set vivis cent kvin jarojn, kaj naskiĝis al li Enoŝ, kaj li profetadis sian tutan vivon, kaj instruis la vojojn de Dio al sia filo Enoŝ; pro tio ankaŭ Enoŝ profetis.

14 Kaj Set vivis, post kiam naskiĝis al li Enoŝ, okcent sep jarojn, kaj naskiĝis al li multaj filoj kaj filinoj.

15 Kaj la homidoj estis multnombraj sur la tuta lando. Kaj en tiuj tagoj Satano regis kun multa forto super la homoj, kaj furiozis en iliaj koroj; kaj el tio venis militoj kaj verŝo de sango; kaj la mano de viro estis kontraŭ lia propra frato, mortigante, pro sekretaj faroj, serĉante potencon.

16 La tuta vivo de Set estis naŭcent dek du jaroj, kaj li mortis.

17 Kaj Enoŝ vivis naŭdek jarojn, kaj naskiĝis al li Kenan. Kaj Enoŝ kaj la cetera popolo de Dio venis el la lando, kiu estis nomita Ŝulon, kaj loĝis en lando de la promeso, al kiu li donis la nomon de sia filo, kiun li nomis Kenan.

18 Kaj Enoŝ vivis, post kiam naskiĝis al li Kenan, okcent dek kvin jarojn, kaj naskiĝis al li multaj filoj kaj filinoj.

19 Kaj Kenan vivis sepdek jarojn, kaj naskiĝis al li Mahalalel. Kaj Kenan vivis,

post kiam naskiĝis al li Mahalalel, okcent kvardek jarojn, kaj naskiĝis al li filoj kaj filinoj. Kaj la tuta vivo de Kenan estis naŭdek dek jaroj, kaj li mortis.

20 Kaj Mahalalel vivis sesdek kvin jarojn, kaj naskiĝis al li Jared. Kaj Mahalalel vivis, post kiam naskiĝis al li Jared, okcent tridek jarojn, kaj naskiĝis al li filoj kaj filinoj. Kaj la tuta vivo de Mahalalel estis okcent naŭdek kvin jaroj, kaj li mortis.

21 Kaj Jared vivis cent sesdek du jarojn, kaj naskiĝis al li Ĥanoĥ, okcent jarojn, kaj naskiĝis al li filoj kaj filinoj. Kaj Jared instruis Ĥanoĥon pri ĉiuj vojoj de Dio.

22 Kaj ĉi tio estas la geneologio de la filoj de Adam, kiu estis la filo de Dio, kun kiu Dio mem interparolis.

23 Kaj ili estis predikantoj de justeco, kaj parolis kaj profetis, kaj vokis al ĉiuj homoj ĉie, ke ili pentu; kaj la kredo estis instruata al la homidoj.

24 Kaj okazis, ke la tuta vivo de Jared estis naŭcent sesdek du jaroj, kaj li mortis.

25 Kaj Ĥanoĥ vivis sesdek kvin jarojn, kaj naskiĝis al li Metuŝelah.

26 Kaj okazis, ke Ĥanoĥ vojaĝis en la lando, inter la popolo; kaj, dum li vojaĝis, la Spirito de Dio malleviĝis el la ĉielo, kaj restis sur li.

27 Kaj li aŭdis voĉon el la ĉelo, kiu diris: Ĥanoĥ mia filo, profetu al ĉi tiu popolo, kaj diru al ili: Pentu, ĉar jenon diras la Eternulo: Mi estas kolera kontraŭ ĉi tiu popolo, kaj mia arda kolero ekbrulis kontraŭ ili; ĉar iliaj koroj malmoliĝis, kaj iliaj oreloj aŭdas malklare, kaj iliaj okuloj ne povas vidi malproksimen;

28 Kaj dum ĉi tiuj multaj generacioj, eĉ de la tago, kiam mi kreis ilin, ili devojiĝis, kaj malkonfesis min, kaj serĉis siajn konsilojn en la mallumo; kaj en siaj abomenaĵoj ili elpensis la murdon, kaj ne obeis la ordonojn, kiujn mi donis al ilia patro, Adam.

29 sekve, ili rompis siajn ĵurojn, kaj, per siaj blasfemoj, ili venigis al si la morton; kaj inferon mi preparis por ili, se ili ne pentos;

30 Kaj tio estas dekreto, kiun mi dissendis en la komenco de la mondo, el mia

propra buŝo, jam de ĝia kreo, kaj per la buŝoj de miaj servantoj, viaj patroj, mi dekretis ĝin, eĉ kiel ĝi estos dissendata en la mondo, ĝis ĝiaj finoj.

31 Kaj, aŭdinte tiujn vortojn, Ĥanoĥ sin sternis al la tero, antaŭ la Eternulo, kaj parolis antaŭ la Eternulo, dirante: Kial okazis, ke mi trovis plaĉon en viaj okuloj, kvankam mi estas nur junulo, kaj ĉiuj homoj malamas min; ĉar mi havas nelertan buŝon; kial mi estas via servanto?

32 Kaj la Eternulo diris al Ĥanoĥ: Eliru kaj faru, kiel mi ordonis al vi, kaj neniuj homoj trapikos vin. Malfermu vian buŝon, kaj ĝi estos plenigita, kaj mi donos al vi parolpovon, ĉar ĉiu karno estas en miaj manoj, kaj mi faros tion, kio ŝajnos al mi bona.

33 Diru al ĉi tiu popolo: Elektu hodiaŭ servi la Eternulon, kiu kreis vin.

34 Jen mia Spirito estas sur vi, pro kio mi pravigos ĉiujn viajn vortojn; kaj la montoj forkuros antaŭ vi, kaj la riveroj deturniĝos de siaj fluejoj; kaj vi restos ĉe mi, kaj mi ĉe vi; do iradu kun mi.

35 Kaj la Eternulo parolis al Ĥanoĥ, kaj diris al li: Ŝmiru per koto viajn okulojn, kaj lavu ilin, kaj vi vidos. Kaj li tion faris.

36 Kaj li vidis la spiritojn, kiujn Dio kreis; kaj li vidis ankaŭ aĵojn, kiuj ne estis videblaj al la natura okulo; kaj de tiam oni diris tra la lando: La Eternulo estigis antaŭvidiston por sia popolo.

37 Kaj okazis, ke Ĥanoĥ eliris tra la lando, inter la popolo, starante sur la montetoj kaj altaj lokoj, kaj kriadis per laŭta voĉo, atestante kontraŭ ĝiaj faroj; kaj ĉiuj homoj ofendiĝis pro li.

38 Kaj ili alvenis por aŭdi lin, sur la altajn lokojn, dirante al la tendgardistoj: Atendu ĉi tie kaj prizorgu la tendojn dum ni iros tien por vidi la antaŭvidiston, ĉar li profetas, kaj okazas stranga afero en la lando; sovaĝa viro venis inter nin.

39 Kaj okazis, kiam ili aŭdis lin, ke neniuj metis la manon sur lin; ĉar timo venis al ĉiuj, kiuj aŭdis lin; ĉar li iradis kun Dio.

40 Kaj venis al li viro, kies nomo estis Mahijaĥ, kaj diris al li: Diru al ni klare, kiu vi

estas, kaj de kie vi venis?

41 Kaj li diris al ili: Mi venis el la lando de Kenan, la lando de miaj patroj, lando de justeco ĝis hodiaŭ. Kaj mia patro instruis min pri ĉiuj vojoj de Dio.

42 Kaj okazis, dum mi vojaĝis de la lando de Kenan, laŭlonge de la maro orienten, mi vidis vizion; kaj jen la ĉielon mi vidis, kaj la Eternulo parolis kun mi, kaj donis al mi ordonon; pro kio, por obei la ordonon, mi eldiras ĉi tiujn vortojn.

43 Kaj Ĥanoĥ daŭrigis sian paroladon, dirante: La Eternulo, kiu parolis kun mi, tiu sama estas la Dio de la ĉielo, kaj la estas mia Dio, kaj via Dio, kaj vi estas miaj fratoj, kaj kial vi konsilas vin mem, kaj malkonfesas la Dion de la ĉielo?

44 La ĉielon li kreis; la tero estas lia piedbenketo; kaj ĝia fundamento estas lia. Jen li metis ĝin; li venigis multe da homoj sur ĝin.

45 Kaj la morto venis al niaj patroj; tamen ni konas ilin, kaj ne povas malkonfesi tion, kaj eĉ la unuan el ĉiuj ni konas eĉ Adamon.

46 Ĉar memorlibron ni skribis inter ni, laŭ la modelo donita per la fingro de Dio; kaj ĝi estas donita en nia propra lingvo.

47 Kaj, dum Ĥanoĥ eldiris la vortojn de Dio, la popolo tremis, kaj ne povis stari antaŭ li.

48 Kaj li diris al ili: Pro tio, ke Adam falis, ni estas; kaj per lia falo venis la morto; kaj ni fariĝis partoprenantoj de mizero kaj malfeliĉo.

49 Jen Satano venis inter la homidojn, kaj tromplogis ilin adori lin; kaj la homoj fariĝis karnaj, laŭsentaj, kaj demonaj, kaj estas forbaritaj de antaŭ Dio.

50 Sed Dio sciigis al niaj patroj, ke ĉiuj homoj devas penti.

51 Kaj li vokis al nia patro Adam per sia propra voĉo, dirante: Mi estas Dio; mi kreis la mondon, kaj la homojn antaŭ ol ili estis en karno.

52 Kaj li ankaŭ diris al li: Se vi turnos vin al mi, kaj aŭskultos mian voĉon, kaj kredos, kaj pentos pri ĉiuj viaj leĝorompoj, kaj baptiĝos, eĉ en akvo, en la nomo de mia

Solenaskita Filo, kiu estas plena de graco kaj vero, kiu estas Jesuo Kristo, la sola nomo kiu estos donita sub la ĉielo, per kiu savo venos al la homidoj, vi ricevos la donacon de la Sankta Spirito, petante ĉion en lia nomo, kaj ĉion, kion vi petos, vi ricevos.

53 Kaj nia patro Adam parolis al la Eternulo, kaj diris: Kial homoj devas penti kaj baptiĝi en akvo? Kaj la Eternulo diris al Adam: Jen mi pardonis al vi vian leĝorompon en la Edena ĝardeno.

54 De tio disvastiĝis la diraĵo inter la popolo: Ke la Filo de Dio akiris pardonon por la origina kulpo, kaj sekve pri la pekoj de la gepatroj ne respondecas la kapoj de la infanoj, ĉar ili estas puraj de la kreo de la mondo.

55 Kaj la Eternulo parolis al Adam, dirante: Kvankam viaj infanoj estas konceptitaj en peko, tamen, kiam ili komencas pliaĝiĝi, la peko koncipiĝas en iliaj koroj, kaj ili gustumas la amarecon por ke ili sciu ŝati la bonon.

56 Kaj al ili estas donata scii bonon de malbono; pro kio ili havas decidpovon por si mem, kaj mi donis al vi plian leĝon kaj plian ordonon.

57 Pro tio instruu al viaj infanoj, ke ĉiuj homoj, ĉie, devos penti, aŭ ili neniel povos heredi la regnon de Dio, ĉar nenio malpura povos loĝi tie, aŭ loĝi antaŭ li; ĉar, en la lingvo de Adam, Homo de Sankteco estas lia nomo, kaj la nomo de lia Solenaskito estas la Filo de Homo, eĉ Jesuo Kristo, justa Juĝanto, kiu venos, kiam la tempo estos matura.

58 Tial mi donas al vi ordonon, instrui ĉi tiujn aferojn malkaŝe al viaj infanoj, dirante:

59 Ke pro rompo de leĝo venas la falo, kiu falo venigas la morton, kaj pro tio, ke vi naskiĝis en la mondon per akvo, kaj per la Spirito, kaj esti purigita per sango, eĉ la sango de mia Solenaskito, por ke vi estu sanktigita el ĉia peko, kaj ĝuu la vortojn de eterna vivo en ĉi tia mondo, kaj eterna vivo en la mondo venonta, eĉ senmorta gloro;

60 Ĉar per la akvo vi obeas la ordonon; per la Spirito vi estas pravigita, kaj

per la sango vi estas sanktigita;

61 Tial estas donitaj resti inter vi: la kroniko de la ĉielo; la Konsolanto; la pacaj aferoj de la senmorta gloro; la vero de ĉio; tiu, kiu vivigas ĉion, kiu donas vivon al ĉio; tiu, kiu scias ĉion, kaj havas ĉiun potencon laŭ saĝo, kompato, vero, justeco, kaj juĝpovo.

62 Kaj nun, jen, mi diras al vi: Tio estas la plano de saviĝo por ĉiuj homoj, per la sango de mia Solenaskito, kiu venos, kiam la tempo estos matura.

63 Kaj jen, ĉio havas sian bildon, kaj ĉio estas kreita kaj farita por atesti pri mi, kaj tio, kio estas portempa, kaj tio, kio estas spirita; tio, kio estas supre en la ĉielo, kaj tio, kio estas sur la tero, kaj tio, kio estas en la tero, kaj tio, kio estas sub la tero, kaj supre kaj sube: ĉio atestas pri mi.

64 Kaj okazis, kiam la Eternulo parolis kun Adam, nia patro, ke Adam kriis al la Eternulo, kaj li estis forkaptita de la Spirito de la Eternulo, kaj portita malsupren en la akvon, kaj sternita sub la akvo, kaj elprenita el la akvo.

65 Kaj tiamaniere li estis baptita, kaj la Spirito de Dio malleviĝis sur lin, kaj tiel li estis naskita de la Spirito, kaj fariĝis vivigita en la interna homo.

66 Kaj li aŭdis voĉon el la ĉielo, kiu diris: Vi estas baptita per fajro, kaj de la Sankta Spirito. Jen la kroniko de la Patro, kaj la Filo, de nun kaj por eterne;

67 Kaj vi estas laŭ la maniero de tiu, kiu estis sen komenco de tagoj aŭ fino de jaroj, de tuta eterneco ĝis tuta eterneco.

68 Jen, vi estas unu en mi, filo de Dio; kaj tiel ĉiuj povas fariĝi miaj filoj. Amen.

## ĈAPITRO 7

### LA SKRIBOJ DE MOSEO

Kiel rivelitaj al Jozefo Smith la Profeto en decembro 1830--Daŭrigo.

KAJ okazis, ke Ĥanoĥ daŭrigis sian paroladon, dirante: Jen, nia patro Adam

instruis tion, kaj multaj kredis kaj fariĝis la filoj de Dio, kaj multaj ne kredis, kaj pereis en siaj pekoj, kaj antaŭen rigardas kun timo, en turmento, ke la arda indigno de Dio estos verŝata sur ilin.

2 Kaj ekde tiu tempo Ĥanon komencis profeti, dirante al la popolo, ke: Kiam mi vojaĝis, kaj staris en la loko Mahuaĥ, kaj kriis al la Eternulo, voĉo venis el la ĉielo, dirante: Turniĝu, kaj iru sur la monton Simeon.

3 Kaj mi turniĝis kaj iris sur la monton; kaj, starante sur la monto, mi vidis la ĉielon malfermiĝi, kaj mi estis vestita per gloro;

4 Kaj mi vidis la Eternulon; kaj li staris antaŭ mia vizaĝo, kaj li parolis kun mi, eĉ kiel homo parolas kun alia homo, vizaĝon kontraŭ vizaĝo; kaj li diris al mi: Rigardu, kaj mi montros al vi la mondon dum la spaco de multaj generacioj.

5 Kaj okazis, ke mi rigardis en la valon de Ŝum, kaj jen granda popolo, kiu loĝis en tendoj, kiu estis la popolo de Ŝum. 6 Kaj denove la Eternulo diris al mi: Rigardu; kaj mi rigardis norden, kaj mi vidis la popolon de Kanaan, kiu loĝis en tendoj.

7 Kaj la Eternulo diris al mi: Profetu; kaj mi profetis, dirante: Jen la popolo de Kanaan, kiu estas multnombra, eliros preta por batalo kontraŭ la popolo de Ŝum, kaj mortigos ĝin tiom, ke ĝi estos tute detruita; kaj la popolo de Kanaan dislokos sin en la lando, kaj la lando estos malfekunda kaj senfrukta, kaj neniu alia popolo loĝos tie krom la popolo de Kanaan;

8 Ĉar jen la Eternulo malbenos la landon per multe de varmo, kaj ĝia malfekundeco daŭros por ĉiam; kaj nigreco venis al ĉiuj infanoj de Kanaan tiel, ke ili estis malestimataj inter ĉiuj popoloj.

9 Kaj okazis, ke la Eternulo diris al mi: Rigardu; kaj mi rigardis, kaj mi vidis la landon de Ŝaron, kaj la landon de Ĥanoĥ, kaj la landon de Omner, kaj la landon de Heni, kaj la landon de Ŝem, kaj la landon de Haner, kaj la landon de Ĥananja, kaj ĉiujn el iliaj loĝantoj;

10 Kaj la Eternulo diris al mi: Iru al ĉi

tiu popolo, kaj diru al ĝi: Pentu, por ke mi ne alvenu kaj frapu ĝin per malbeno kaj ĝi mortu.

11 Kaj li donis al mi ordonon, ke mi baptu en la nomo de la Patro, kaj de la Filo, kiu estas plena de graco kaj vero, kaj de la Sankta Spirito, kiu portas ateston pri la Patro kaj la Filo.

12 Kaj okazis, ke Ĥanoĥ daŭre vokis al la tuta popolo, krom la popolo de Kanaan, ke ĝi pentu;

13 Kaj tiel granda estis la fido de Ĥanoĥ, ke li gvidis la popolon de Dio, kaj iliaj malamikoj venis por batali kontraŭ ili; kaj li parolis la vorton de la Eternulo, kaj la tero tremis, kaj la montoj forkuris eĉ laŭ lia ordono; kaj la riveroj de akvo estis deturnitaj de siaj fluejoj; kaj la blekado de la leonoj audiĝis el la dezerto; kaj ĉiuj nacioj timegis, tiel potenca estis la vorto de Ĥanoĥ, kaj tiel granda estis la potenco de la lingvo, kiun Dio donis al li.

14 Tero leviĝis el la profundo de la maro, kaj tiel granda estis la timo de la malamikoj de la popolo de Dio, ke ili fuĝis kaj staris malproksime kaj iris sur la teron, kiu leviĝis el la profundo de la maro.

15 Kaj ankaŭ la gigantoj de la lando staris malproksime; kaj eliris malbeno kontraŭ ĉiuj popoloj, kiuj batalis kontraŭ Dio.

16 Kaj ekde tiam militoj kaj verŝa do de sango okazis inter ili; sed la Eternulo venis kaj vivis kun sia popolo, kaj ĝi vivis en justeco.

17 La timo pri la Eternulo estis ĉe ĉiuj nacioj, tiel granda estis la gloro de la Eternulo, kiu estis sur lia popolo. Kaj la Eternulo benis la landon, kaj ili estis benataj sur la montoj, kaj sur la altaj lokoj, kaj prosperis.

18 Kaj la Eternulo nomis sian popolon Cion, ĉar ĝi estis unukora kaj unuanima, kaj vivis en justeco; kaj en ĝi neniu estis malriĉa.

19 Kaj Ĥanoĥ daŭrigis sian predikadon de justeco al la popolo de Dio. Kaj okazis en liaj tagoj, ke li konstruis urbon, kiu estis nomita la Urbo de Sankteco, alivorte, Cion.

20 Kaj okazis, ke Ĥanoĥ parolis kun la Eternulo; kaj li diris al la Eternulo: Certe Cion vivos en sekureco por ĉiam. Sed la Eternulo

diris al Ĥanoĥ: Cionon mi benis, sed la ceterajn popolojn mi malbenis.

21 Kaj okazis, ke la Eternulo montris al Ĥanoĥ ĉiujn loĝantojn de la tero; kaj li rigardis, kaj jen post la tempo Cion estis prenita supren en la ĉielon. Kaj la Eternulo diris al Ĥanoĥ: Jen mia loĝloko por eterne.

22 Kaj Ĥanoĥ rigardis ankaŭ la ceterajn popolojn, kiuj estis la filoj de Adam; kaj ili estis miksaĵo de la tuta idaro de Adam, krom la idaro de Kain, ĉar la idaro de Kain estis nigra kaj ne havis lokon inter ili.

23 Kaj post kiam Cion estis prenita supren en la ĉielon, Ĥanoĥ rigardis, kaj jen ĉiuj nacioj de la tero estis antaŭ li;

24 Kaj generacio sekvis generacion; kaj Ĥanoĥ estis alta kaj suprenlevita, eĉ en la sino de la Patro, kaj de la Filo de Homo; kaj jen la potenco de Satano estis sur la tuta supraĵo de la tero.

25 Kaj li vidis anĝelojn malleviĝantajn el la ĉielo; kaj li aŭ dis laŭtan voĉon, kiu diris: Ve, ve al la loĝantoj de la tero.

26 Kaj li vidis Satanon; kaj li havis grandan katenon en sia mano, kaj ĝi vualis la tutan supraĵon de la tero per mallumo; kaj li supren rigardis kaj ridis, kaj liaj anĝeloj ĝojis.

27 Kaj Ĥanoĥ vidis anĝelojn malleviĝantajn el la ĉielo, portantajn ateston pri la Patro kaj Filo; kaj la Sankta Spirito falis sur multajn, kaj ili estis prenitaj supren en Cionon per la potencoj de la ĉielo.

28 Kaj okazis, ke la Dio de la ĉielo rigardis la ceterajn popolojn, kaj li ploris; kaj Ĥanoĥ rimarkis tion, dirante: Kial la ĉielo ploras, kaj elverŝas siajn larmojn kiel pluvon sur la montojn?

29 Kaj Ĥanoĥ diris al la Eternulo: Kiel okazas, ke vi povas plori, ĉar oni scias, ke vi estas sankta, kaj de ĉiu eterneco al ĉiu eterneco?

30 Kaj se estus eble, ke homo povus nombri la partiklojn de la tero, jes, milionoj da teroj kiel ĉi tiu, tio ne estus komenco de la nombro de viaj kreitaĵoj; kaj viaj tapiŝoj estas eĉ pli disetenditaj; kaj tamen vi estas tie, kaj via sino estas tie; kaj vi estas ankaŭ justa; vi estas kompata kaj bonkora por eterne;

31 Kaj vi prenis Cionon en vian sinon, el ĉiuj viaj kreitaĵoj, de ĉiu eterneco al ĉiu eterneco; kaj nur paco, justeco, kaj vero estas la fundamento de via trono; kaj la kompato iros antaŭ via vizaĝo kaj ne havos finon; kiel estas, ke vi povas plori?

32 La Eternulo diris al Ĥanoĥ: Rigardu ĉi tiujn viajn fratojn; ili estas la faritaĵo de miaj propraj manoj, kaj mi donis al ili ilian scion, en la tago, kiam mi kreis ilin; kaj en la Edena ĝardeno mi donis al la homo lian propran decidpovon;

33 Kaj al viaj fratoj mi diris, kaj ankaŭ donis ordonon, ke ili amu unu la alian, kaj ke ili elektu min, sian Patron; sed jen ili estas sen amemo, kaj ili malamas sian propran sangon;

34 Kaj la fajro de mia indigno estas ekbruligita kontraŭ ili; kaj en mia varma malplaĉo mi ensendos diluvon kontraŭ ili, ĉar mia arda kolero brulas kontraŭ ili.

35 Jen, mi estas Dio; Homo de Sankteco estas mia nomo; Homo de Konsilo estas mia nomo; kaj ankaŭ Senfina kaj Eterna estas mia nomo.

36 Pro tio mi povas etendi miajn manojn kaj teni ĉiujn el la kreaĵoj, kiujn mi faris; kaj ankaŭ mia okulo povas penetri ilin, kaj inter la tuta faritaĵaro de miaj manoj ne okazis malboneco tiel granda, kiel inter viaj fratoj.

37 Sed jen iliaj pekoj estos sur la kapoj de iliaj patroj; Satano estos ilia patro, kaj mizero estos ilia sorto; kaj la tuta ĉielo ploros super ili, eĉ la tuta faritaĵaro de miaj manoj; kial do la ĉielo ne ploru, vidante, ke ili suferos?

38 Sed jen tiuj, kiujn viaj okuloj rigardas, pereos en la diluvo; kaj jen mi enfermos ilin; malliberejon mi preparis por ili.

39 Kaj tiu, kiun mi elektis, pledis antaŭ mia vizaĝo. Sekve, li suferas pro iliaj pekoj; pro tio, ke ili pentos en la tago, kiam mia Elektito revenos al mi, kaj ĝis tiu tago ili estos en turmento;

40 Pro tio la ĉielo ploros, jes, kaj la tuta faritaĵaro de miaj manoj.

41 Kaj okazis, ke la Eternulo parolis al Ĥanoĥ, kaj sciigis al Ĥanoĥ ĉiujn farojn de la

homidoj; pro kio Ĥanoĥ sciis, kaj rigardis ilian malbonecon, kaj ilian mizeron, kaj ploris kaj etendis siajn brakojn, kaj lia koro ŝveliĝis vaste kiel la eterneco; kaj lia interno ekflamis pro kompato; kaj la tuta eternaĵaro tremis.

42 Kaj Ĥanoĥ vidis ankaŭ Noan, kaj lian familion; ke la idaro de ĉiuj filoj de Noa estos savita per portempa saviĝo;

43 Sekve Ĥanoĥ vidis, ke Noa konstruis arkeon; kaj ke la Eternulo favore ridetis ĉe ĝi, kaj tenis ĝin en sia mano; sed sur la ceterajn malbonulojn la diluvo venis kaj englutis ilin.

44 Kaj, vidinte tion, Ĥanoĥ havis amarecon en sia animo, kaj ploris pro siaj fratoj, kaj diris al la ĉielo: Mi rifuzos esti konsolata; sed la Eternulo diris al Ĥanoĥ: Altigu vian koron, kaj ĝoju; kaj rigardu.

45 Kaj okazis, ke Ĥanoĥ rigardis; kaj ekde Noa, li vidis ĉiujn familiojn de la tero; kaj li kriis al la Eternulo, dirante: Kiam venos la tago de la Eternulo? Kiam la sango de la Virtulo estos elverŝata por ke tiuj, kiuj lamentas, povu esti sanktigitaj kaj havu eternan vivon?

46 Kaj la Eternulo diris: Tio okazos, kiam la tempo estos matura, en la tagoj de malboneco kaj venĝo.

47 Kaj jen, Ĥanoĥ vidis la tagon de la veno de la Filo de Homo, eĉ en karno; kaj lia animo ĝojis, dirante: La Virtulo estas altigita, kaj la Ŝafido estas mortigita de la fondo de la mondo; kaj per kredo mi estas en la sino de la Patro, kaj jen Cion estas ĉe mi.

48 Kaj okazis, ke Ĥanoĥ rigardis la teron; kaj li aŭdis voĉon el ĝia interno, kiu diris: Ve, ve al mi, la patrino de homoj; mi doloras, mi lacas, pro la malboneco de miaj infanoj. Kiam mi ripozos, kaj estos purigita el la malpuraĵo, kiu eliris el mi? Kiam mia Kreinto sanktigos min, por ke mi ripozu, kaj virto por iom da tempo restu sur mia vizaĝo?

49 Kaj, kiam Ĥanoĥ aŭdis la teron lamentanta, li ploris, kaj kriis al la Eternulo, dirante: Ho, Eternulo, ĉu vi ne havos kompaton al la tero? Ĉu vi ne benos la infanojn de Noa?

50 Kaj Ĥanoĥ daŭrigis sian krion al la

Eternulo dirante: Mi petas vin, ho Eternulo, en la nomo de via Solenaskito, eĉ Jesuo Kristo, ke vi kompatu Noan kaj lian idaron, ke la tero neniam plu estu kovrata per diluvo.

51 Kaj la Eternulo ne povis rifuzi; kaj li faris interligon kun Ĥanoĥ, kaj promesis al li kun ĵuro, ke li ĉesigos la diluvon; ke li alvokos la infanojn de Noa;

52 Kaj li elsendis neŝanĝeblan dekretan, ke restaĵo de lia idaro estu ĉiam trovebla inter ĉiuj nacioj, dum la tero ekzistos;

53 Kaj la Eternulo diris: Benata estas tiu per kies semo la Mesio venos; ĉar li diras: Mi estas la Mesio, la Reĝo de Cion, la Roko de la Ĉielo, kiu estas tiel vasta kiel la eterneco; kiu ajn eniras per la pordego kaj grimpas ĝis mi, tiu neniam falos; pro tio benataj estas tiuj pri kiuj mi parolis, ĉar ili elvenos kun kantoj de eterna ĝojo.

54 Kaj okazis, ke Ĥanoĥ kriis al la Eternulo, dirante: Kiam la Filo de Homo venos en karno, ĉu la tero ripozos? Mi petas al vi, montru al mi ĉi tion.

55 Kaj la Eternulo diris al Ĥanoĥ: Rigardu; kaj li rigardis kaj vidis la Filon de Homo levitan sur la kruco, laŭ la maniero de homoj;

56 Kaj li aŭdis laŭtan voĉon; kaj la ĉielo vualiĝis; kaj ĉiuj kreitaĵoj de Dio lamentis; kaj la tero ĝemis; kaj la rokoj diskrevis; kaj la sanktuloj leviĝis, kaj estis kronitaj per kronoj de gloro, dekstre de la Filo de Homo;

57 Kaj ĉiuj spiritoj, kiuj estis en malliberejo, elvenis, kaj staris dekstre de Dio; kaj la ceteraj estis rezervataj en katenoj de mallumo por la juĝo de la granda tago.

58 Kaj Ĥanoĥ denove ploris kaj kriis al la Eternulo, dirante: Kiam la tero ripozos?

59 Kaj Ĥanoĥ vidis la Filon de Homo supreniri al la Patro; kaj li vokis al la Eternulo, dirante: Ĉu vi ne revenos sur la teron? Pro tio, ke vi estas Dio, kaj mi konas vin, kaj vi ĵuris al mi, kaj ordonis al mi, ke mi petu en la nomo de via Solenaskito; vi kreis min, kaj donis al mi rajton al via trono, kaj ne pro mi, sed per via propra graco; pro tio, mi demandas vin, ĉu vi ne revenos sur la teron.

60 Kaj la Eternulo diris al Ĥanoĥ: Kiel mi vivas, mi venos en la lastaj tagoj, en la tagoj de malboneco kaj venĝo, por plenumi la ĵuron, kiun mi faris al vi pri la infanoj de Noa;

61 Kaj la tago venos, kiam la tero ripozos, sed antaŭ tiu tago la ĉielo mallumiĝos, kaj vualo de mallumo kovros la teron; kaj la ĉielo tremos, kaj ankaŭ la tero; kaj grandaj afliktoj estos inter la homidoj, sed mian popolon mi gardos;

62 Kaj justecon mi malsupren sendos el la ĉielo; kaj veron mi elsendos el la tero por atesti pri mia Solenaskito; lia releviĝo el la mortintoj; jes, kaj ankaŭ la releviĝo de ĉiuj homoj; kaj mi kaŭzos, ke la justeco kaj la vero baldaŭ la teron kvazaŭ per inundo, por kunigi miajn elektitojn el la kvar anguloj de la tero, en loko, kiun mi preparos, Sankta Urbo, por ke mia popolo ĉirkaŭzonu siajn lumbojn, kaj atendu la tempon de mia veno; ĉar tie estos mia tabernaklo, kaj ĝi havos la nomon Cion, Nova Jerusalemo.

63 Kaj la Eternulo diris al Ĥanoĥ: Tiam vi kaj via tuta urbo renkontos ilin tie, kaj ni ricevos ilin en nian sinon, kaj ili vidos nin; kaj ni etos nin sur iliajn kolojn, kaj ili etos sin sur niajn kolojn, kaj ni kisos unu la aliajn;

64 Kaj tie estos mia loĝloko, kaj ĝi estos Cion, kiu elvenos el ĉiuj kreitaĵoj, kiujn mi faris; kaj dum la daŭro de mil jaroj la tero ripozos.

65 Kaj okazis, ke Ĥanoĥ vidis la tagon de la veno de la Filo de Homo, en la lastaj tagoj, por loĝi sur la tero en justeco por la daŭro de mil jaroj;

66 Sed antaŭ tiu tago li vidis grandajn afliktojn inter la malbonuloj; kaj li vidis, ke ankaŭ la maro estis maltrankvila, kaj ke la koroj de homoj forlasis ilin, atendante kun timo la juĝojn de Dio la Plejpotenca, kiuj venos kontraŭ la malbonuloj.

67 Kaj la Eternulo montris al Ĥanoĥ ĉion, eĉ ĝis la fino de la mondo; kaj li vidis la tagon de la virtuloj, la horon de ilia savo; kaj ricevis plenecon da ĝojo;

68 Kaj la tuta vivo de Cion, en la tagoj de Ĥanoĥ, estis tricent sesdek kvin jaroj.

69 Kaj Ĥanoĥ kaj lia tuta popolo iradis

kun Dio, kaj li loĝis en la mezo de Cion; kaj okazis, ke Cion malaperis, ĉar Dio prenis ĝin en sian sinon; kaj de tio venis la diraĵo: CION FORFLUGIS.

## ĈAPITRO 8

### LA SKRIBOJ DE MOSEO

Kiel rivelitaj al Jozefo Smith la Profeto en decembro 1830--Fino.

KAJ la tuta vivo de Ĥanoĥ estis kvarcent tridek jaroj.

2 Kaj okazis, ke Metuŝelaĥ, la filo de Ĥanoĥ, ne estis prenita, por ke la interligo de la Eternulo, kiun li faris kun Ĥanoĥ, estu plenumita; ĉar li vere promesis al Ĥanoĥ, ke Noa estu el la frukto de liaj lumboj.

3 Kaj okazis, ke Metuŝelaĥ profetis, ke el liaj lumboj fontos ĉiuj regnoj de la tero (tra Noa), kaj li gloris sin pri tio.

4 Kaj okazis forta malsato en la lando, kaj la Eternulo malbenis la teron per terura malbeno, kaj multaj el la loĝantoj sur ĝi mortis.

5 Kaj okazis, ke Metuŝelaĥ vivis cent okdek sep jarojn, kaj naskiĝis al li Lemeh;

6 Kaj Metuŝelaĥ vivis, post kiam naskiĝis al li Lemeh, sepcent okdek du jarojn, kaj naskiĝis al li filoj kaj filinoj.

7 Kaj la tuta vivo de Metuŝelaĥ estis naŭcent sesdek naŭ jaroj, kaj li mortis.

8 Kaj Lemeh vivis cent okdek du jarojn, kaj naskiĝis al li filo,

9 Kaj li donis al li la nomon Noa, dirante: Ĉi tiu filo konsolos nin en niaj faroj kaj en la laboroj de niaj manoj sur la tero, kiun la Eternulo malbonis.

10 Kaj Lemeh vivis, post kiam naskiĝis al li Noa, kvincent naŭdek kvin jarojn, kaj naskiĝis al li filoj kaj filinoj;

11 Kaj la tuta vivo de Lemeh estis sepcent sepdek sep jaroj, kaj li mortis.

12 Kaj Noa vivis kvarcent kvindek jarojn, kaj al li naskiĝis Jafet; kaj kvardek du jarojn poste al li naskiĝis Ŝem el tiu, kiu estis

la patrino de Jafet, kaj, kiam li vivis kvincent jarojn, al li naskiĝis Ĥam.

13 Kaj Noa kaj liaj filoj aŭskultis al la Eternulo, kaj atentis, kaj ili estis nomitaj la filoj de Dio.

14 Kaj, kiam ĉi tiuj homoj komencis multiĝi sur la tero, kaj al ili naskiĝis filinoj, tiam la homidoj vidis, ke tiuj filinoj estas belaj, kaj ili prenis al si edzinojn, laŭ sia elekto.

15 Kaj la Eternulo diris al Noa: La filinoj de viaj filoj vendis sin; ĉar jen mia kolero ekbrulis kontraŭ la homidoj, ĉar ili ne volas aŭskulti mian voĉon.

16 Kaj okazis, ke Noa profetis, kaj instruis la aferojn de Dio, same kiel estis en la komenco.

17 Kaj la Eternulo diris al Noa: Ne regos mia Spirito inter la homoj eterne, ĉar ili scios, ke ĉiu karno mortos; tamen ilia vivo estos cent dudek jaroj; kaj, se la homoj ne pentos, mi ensendos la diluvon sur ilin.

18 Kaj gigantoj estis sur la tero en tiu tempo, kaj ili serĉis Noan por senvivigi lin; sed la Eternulo estis kun Noa, kaj la potenco de la Eternulo estis sur li.

19 Kaj la Eternulo elektis Noan laŭ sia propra ordono, kaj ordonis lin, ke li eliru kaj prediku lian Evangelion al la homidoj, same kia ĝi estis donita al Ĥanoĥ.

20 Kaj okazis, ke Noa vokis al la homidoj, ke ili pentu; sed ili ne aŭskultis liajn vortojn;

21 Kaj plie, aŭdinte lin, ili venis antaŭ lin, dirante: Jen ni estas la filoj de Dio; ĉu ni ne prenis al ni la filinojn de la homoj? Kaj ĉu ni ne manĝas kaj trinkas, kaj edziĝas kaj edzigas? Kaj niaj edzinoj naskas al ni infanojn, kaj tiuj estas fortuloj, kiuj similas al la viroj de plej antikva tempo, tre famaj viroj. Kaj ili ne aŭskultis la vortojn de Noa.

22 Kaj Dio vidis, ke granda fariĝis la malboneco de la homoj sur la tero; kaj ke ĉiuj pensoj kaj intencoj leviĝis en ĉies koroj, estante nur malbono en ĉiu tempo.

23 Kaj okazis, ke Noa daŭrigis sian predikadon al la popolo, dirante: Aŭskultu, kaj atentu miajn vortojn;



24 KREDU kaj pentu pri viaj pekoj kaj baptiĝu en la nomo de Jesuo Kristo, la Filo de Dio, same kiel niaj patroj, kaj vi ricevos la Sanktan Spiriton por ke ĉio elmontriĝu al vi; kaj, se vi ne faros tion, la diluvo envenos al vi; tamen ili ne aŭskultis.

25 Kaj tio ĉagrenis Noan, kaj lia koro lin doloris, ke la Eternulo kreis la homon sur la tero, kaj li afliktiĝis en sia koro.

26 Kaj la Eternulo diris: Mi ekstermos de sur la tero la homon, kiun mi kreis, de la homo ĝis la brutoj, ĝis la rampaĵoj, kaj ĝis la birdoj de la ĉielo; ĉar ĉagrenis Noan, ke mi ilin kreis, kaj ke mi ilin faris; kaj li vokis al mi; ĉar ili deziris senvivigi lin.

27 Kaj tiel Noa akiris plaĉon en la okuloj de la Eternulo; ĉar Noa estis homo virta kaj senmakula en sia generacio; kaj kun Dio li iradis, kaj tion faris ankaŭ liaj tri filoj, Ŝem, Ĥam, kaj Jafet.

28 La tero malvirtigiĝis antaŭ Dio, kaj ĝi pleniĝis de maljustaĵoj.

29 Kaj Dio vidis la teron, ke ĝi malvirtigiĝis, ĉar ĉiu karno malvirtigis sian vojon sur la tero.

30 Kaj Dio diris al Noa: La fino de ĉiu karno venis antaŭ min, ĉar la tero pleniĝis de perforto, kaj jen mi pereigos ĉiun karnon de sur la tero.

## LA LIBRO DE ABRAHAM

TRADUKITA DE Jozefo SMITH EL LA PAPIRUSO

Traduko de pluraj antikvaj kronikoj, kiuj venis en niajn manojn el la katakomboj de Egiptujo.--Skriboj de Abraham dum li estis en Egiptujo, nomitaj la Libro de Abraham, skribitaj per lia propra mano, sur papiruso. Vidu History of the Church (Historio de la

Eklezio), vol. 2, p. 235, 236, 348-351.

## ĈAPITRO 1

EN la lando de la Ĥaldeoj, en la loĝejo de mia patro, mi, Abraham, vidis, ke estis necese, ke mi akiru alian loĝlokon;

2 Kaj opiniante, ke estas pli de feliĉo kaj paco kaj ripozo por mi tie, mi serĉis la benojn de la patroj, kaj la rajton esti enoficigita por servi ilin; mem estinte sekvanto de la virto, ankaŭ dezirante esti posedanto de multa scio, kaj pli granda sekvanto de la virto, kaj posedi pli grandan scion, kaj esti patro de multe da popoloj, princo de paco, kaj dezirante ricevi instruojn, kaj obei la ordonojn de Dio, mi fariĝis laŭrajta heredanto, ĉefpastro, tenanta la rajton, kiu apartenis al la patroj.

3 Tion la patroj donis al mi; ĝi devenis de la patroj, de la komenco de la tempo, jes, eĉ de la komenco, aŭ antaŭ la fondo de la tero ĝis la nuna tempo, eĉ la rajto de la unuenaskito, de la unua homo, kiu estas Adam, nia unua patro, tra la patroj ĝis mi.

4 Mi serĉis mian konsekriĝon al la Pastraro laŭ la promeso de Dio al la patroj pri la idaro.

5 Miaj patroj, turninte sin de sia virteco, kaj de la sanktaj ordonoj, kiujn la Eternulo, ilia Dio, donis al ili, por adori la diojn de la nacioj (paganoj), absolute rifuzis aŭskulti mian voĉon;

6 Ĉar iliaj koroj inklinitis fari malbonon, kaj estis komplete turnitaj al la dio de Elkena, kaj la dio de Libna, kaj la dio de Maĥmakra, kaj la dio de Koraŝ, kaj la dio de Faraono, reĝo de Egiptujo;

7 Pro tio ili turnis siajn korojn al la buĉoferado de la nacioj, oferante siajn infanojn al iliaj mutaj idoloj, kaj ne aŭskultis mian voĉon, sed klopodis forpreni mian vivon per la mano de la pastro de Elkena. La pastro de Elkena estis ankaŭ la pastro de Faraono.

8 Nu, en ĉi tiu epoko la pastro de Faraono, la reĝo de Egiptujo, kutimis oferi virojn, virinojn, kaj infanojn sur la altaro, kiu estis konstruita en la lando Ĥaldeujo, por la

oferado al ĉi tiuj fremdaj dioj.

9 Kaj okazis, ke pastro faris oferon al la dio de Faraono, kaj ankaŭ al la dio de Ŝagril, laŭ la maniero de la egiptoj. Nu, la dio de Ŝagril estis la suno.

10 Eĉ dankoferon de infano faris la pastro de Faraono sur la altaro, kiu staris ĉe la monteto nomita Monteto de Potifar, super la ebenaĵo de Oliŝem.

11 Nu, ĉi tiu pastro jam oferis sur ĉi tiu altaro samtempe tri virgulinon, kiuj estis la filinoj de Onita, unu el la reĝa linio rekte el la lumbo de Ĥam. Tiuj virgulinaj estis oferitaj pro sia virto; ili rifuzis kliniĝi por adori diojn el ligno aŭ el ŝtono; pro tio ili estis mortigitaj sur ĉi tiu altaro, kaj tio estis farita laŭ la maniero de la egiptoj.

12 Kaj okazis, ke la pastroj faris perforton al mi por ke ili mortigu ankaŭ min, kiel ili mortigis tiujn virgulinon sur ĉi tiu altaro; kaj, por ke vi havu scion pri ĉi tiu altaro, mi referencas al vi la bildon, kiu antaŭas ĉi tiun kronikon.

13 Ĝi estis farita laŭ la formo de lito tia, kian havis la Ĥaldeoj, kaj ĝi staris antaŭ la dioj de Elkena, Libna, Maĥmakra, Koraŝ, kaj ankaŭ antaŭ dio simila al tiu de Faraono, reĝo de Egiptujo.

14 Por ke vi havu komprenon pri ĉi tiuj dioj, mi donis al vi bildon de ili en la figuroj ĉe la komenco, kiu formo de figuro estas nomita de la Ĥaldeoj Ralinos, kiu signifas hieroglifon.

15 Kaj kiam ili suprenlevis siajn manojn kontraŭ mi por oferi min kaj forpreni mian vivon, jen mi levis mian voĉon al la Eternulo, mia Dio, kaj la Eternulo aŭskultis kaj aŭdis, kaj li plenigis min per vizio de la Plejpotenca, kaj la anĝelo de antaŭ li staris apud mi, kaj tuj malligis miajn ligilojn;

16 Kaj lia voĉo diris al mi: Abraham, Abraham, aŭskultu, mia nomo estas Javeo, kaj mi ja aŭdis vin, kaj venis ĉi tien por liberigi vin, kaj por forpreni vin de la domo de via patro, kaj de ĉiuj viaj parencoj, en fremdan landon, kiun vi ne konas;

17 Kaj tion mi faros, ĉar ili forturnis siajn korojn de mi por adori la dion de Elkena,

kaj la dion de Libna, kaj la dion de Maĥmakra, kaj la dion de Koraŝ, kaj la dion de Faraono, reĝo de Egiptujo; pro tio mi venis ĉi tien por viziti ilin, kaj por detru tiun, kiu levis sian manon kontraŭ vi, Abraham, mia filo, por forpreni vian vivon.

18 Jen, mi kondukos vin per mia mano, kaj mi prenos vin por meti sur vin mian nomon, eĉ la Pastrecon de via patro, kaj mia potenco estos super vi.

19 Kiel okazis ĉe Noa, tiel okazos ĉe vi; sed per via servado mia nomo estos konata sur la tero por eterne, ĉar mi estas via Dio.

20 Jen, la Monteto de Potifar estis en la lando de Ur la Ĥaldeo. Kaj la Eternulo disrompis la altaron de Elkena, kaj de la dioj de la lando, kaj tute detruis ilin, kaj frapis la pastron tiel, ke li mortis; kaj okazis granda funebrado en Ĥaldeujo, kaj ankaŭ en la kortego de Faraono; kiu Faraono signifas reĝon per reĝa sango.

21 Nu, ĉi tiu reĝo de Egiptujo estis ido el la lumbo de Ĥam, kaj estis partoprenanto en la sango de la Kanaanidoj per naskiĝo.

22 De ĉi tiu linio fontis ĉiuj egiptoj, kaj tiel la sango de la Kanaanidoj estis konservata en la lando.

23 La lando Egiptujo estis unue trovita de virino, kiu estis la filino de Ĥam, kaj la filino de Egiptus, kiu en la Ĥaldeo lingvo signifas Egiptujon, kiu signifas tion, kio estas malpermesita.

24 Kiam tiu ĉi virino trovis la landon, ĝi estis sub akvo, kaj ŝi poste enlokigis siajn filojn tie; kaj tiel, el Ĥam, fontis tiu raso, kiu konservis la malbenon en la lando.

25 Nu, la unua regado de Egiptujo estis starigita de Faraono, la plej aĝa filo de Egiptus, la filino de Ĥam, kaj tio okazis laŭ la maniero de la regado de Ĥam, kiu estis patriarka.

26 Faraono, estante justa homo, starigis sian regnon kaj juĝis sian popolon saĝe kaj juste dum sia tuta vivo, fervore celante imiti tiun ordon, kiun la patroj starigis en la unuaj generacioj, en la tagoj de la unua patriarka regno, nome, en la regno de Adam, kaj ankaŭ de Noa, lia patro, kiu benis lin per la

benoj de la tero, kaj per la benoj de la saĝo, sed malbenis lin rilate al la Pastreco.

27 Nu, ĉar Faraono estis el linio per kiu li ne havis la rajton de Pastreco, kvankam la faraonoj volonte pretendis ĝin de Noa, tra Ĥam, tial mia patro estis forkondukita per ilia idolservado;

28 Sed mi poste penos skizi la kronologion, kiu iras de mi ĝis la komenco de la kreado, ĉar venis en miajn manojn la analoj, kiujn mi tenas ĝis la nuna tempo.

29 Nu, post kiam la pastro de Elkena estis frapita tiel ke li mortis, plenumiĝis tio, kio estis dirita al mi pri la lando Ĥaldeujo, ke okazos malsato en la lando.

30 Malsato do regis tra la tuta lando Ĥaldeujo, kaj mia patro estis terure turmentata pro la malsato, kaj li pentis pri la malbono, kiun li decidis kontraŭ mi, por forpreni mian vivon.

31 Sed la analojn de la patroj, tio estas, de la patriarkoj, pri la rajto de Pastreco, la Eternulo, mia Dio, konservis en miaj propraj manoj; tial scion pri la komenco de la kreado, kaj ankaŭ pri la planedoj, kaj pri la steloj, kiel ili estis konigitaj al la patroj, mi konservis eĉ ĝis ĉi tiu tago, kaj mi klopodos skribi kelkajn el ĉi tiuj aferoj en ĉi tiu kroniko, por la profito de mia idaro, kiu venos post mi.

## ĈAPITRO 2

NU, la Eternulo tre grandigis la malsaton en la lando de Ur, tiom ke Haran, mia frato, mortis; sed Teraĥ, mia patro, ankoraŭ vivis en la lando de Ur la Ĥaldea.

2 Kaj okazis, ke mi, Abraham, prenis al mi Sarajn kiel edzinon, kaj Naĥor, mia frato, prenis al si Milkan kiel edzinon; ili estis filinoj de Haran.

3 Kaj la Eternulo diris al mi: Abraham, iru el via lando, el inter via parenkaro, kaj el la domo de via patro, al la lando, kiun mi montrus al vi.

4 Mi do eliris el la lando de Ur la Ĥaldea por iri en la landon Kanaan; kaj mi prenis Loton, la filon de mia frato, kaj lian edzinon, kaj mian edzinon Saraj; kaj ankaŭ

mia patro sekvis post mi, en la landon, kiun ni nomis Ĥaran.

5 Kaj la malsato malfortiĝis; kaj mia patro restis en Ĥaran kaj loĝis tie, ĉar estis multe da ŝafaroj en Ĥaran; kaj mia patro returnis sin al sia idolservado, kaj pro tio restis en Ĥaran.

6 Sed mi, Abraham, kaj Lot, la filo de mia frato, preĝis al la Eternulo, kaj la Eternulo aperis al mi, kaj diris al mi: Leviĝu, kaj prenu Loton kun vi; ĉar mi decidis forpreni vin el Ĥaran, kaj faru el vi servanton por porti mian nomon en fremda lando, kiun mi donos al via idaro post vi kiel eternan posedaĵon, kiam ili aŭskultos mian voĉon.

7 Ĉar mi estas la Eternulo, via Dio; mi loĝas en la ĉielo; la tero estas mia piedbenko; mi etendas mian manon super la maro, kaj ĝi obeas mian voĉon; mi faras la venton kaj la fajron mia ĉaro; mi diras al la montoj: Iru for de ĉi tie; kaj jen ili estas forprenitaj per kirlventego, tuj, subite.

8 Mia nomo estas Javeo, kaj mi distingas la finon de la komenco; pro tio mia mano estos super vi.

9 Kaj mi faros vin granda popolo, kaj mi supermezure benos vin, kaj grandigos vian nomon inter ĉiuj popoloj, kaj vi estos beno al via idaro post vi, por ke en siaj manoj ili portu ĉi tiun servadon kaj Pastradon al ĉiuj popoloj;

10 Kaj mi benos ilin per via nomo; ĉar ĉiuj, kiuj ricevos ĉi tiun Evangelion, estos nomitaj laŭ via nomo, kaj estos proklamitaj via idaro, kaj leviĝos kaj benos vin, kiel sian patron;

11 Kaj mi benos viajn benantojn, kaj viajn malbenantojn mi malbenos; kaj per vi (tio estas, per via Pastrado) kaj per via idaro (tio estas, via Pastrado), ĉar mi donas al vi promeson, ke ĉi tiu rajto daŭros en vi, kaj en via idaro post vi (tio estas, la laŭvorta idaro, aŭ la idaro de la korpo) beniĝos ĉiuj gentoj de la tero, eĉ per la benoj de la Evangelio, kiuj estas la benoj de saviĝo, eĉ de vivo eterna.

12 Nu, post kiam la Eternulo, parolinte al mi, foriris kaj fortiris sian vizaĝon de mi, mi diris en mia koro: Via servanto fervore serĉis vin; nun mi trovis vin;

13 Vi sendis vian anĝelon por savi min de la dioj de Elkena, kaj mi agos bone, se mi aŭskultos vian voĉon; do permesu, ke via servanto leviĝu kaj foriru en paco.

14 Kaj mi, Abraham, iris, kiel la Eternulo diris al mi, kaj kun mi Lot; kaj mi, Abraham, havis la aĝon de sesdek du jaroj, kiam mi eliris el Ĥaran.

15 Kaj mi prenis Sarajn, kiun mi edzinigis, kiam mi estis en Ur la Ĥaldea, kaj Loton, la filon de mia frato, kaj nian tutan havon, kiun ni akiris, kaj la animojn, kiujn ni konvertis en Ĥaran, kaj eliris per la vojo al la lando Kanaana, kaj survoje ni loĝis en tendoj;

16 Tiamaniere la eterneco estis nia kovro kaj nia roko kaj nia savo, dum ni vojaĝis de Ĥaran tra Ĵerŝon por iri al la lando Kanaana.

17 Mi, Abraham, do konstruis altaron en la lando Ĵerŝona, kaj faris oferon al la Eternulo, kaj preĝis, ke la malsato estu forturnita de la domo de mia patro por ke ili ne pereu.

18 Kaj poste ni pasis de Ĵerŝon tra la lando al la loko Ŝeĥem; ĝi situis sur la ebenaĵo de More, kaj ni jam atingis la limojn de la lando de la Kanaanidoj, kaj mi oferis buĉoferon tie sur la ebenaĵo de More, kaj pie preĝadis al la Eternulo, ĉar ni jam eniris la landon de tiu idolservanta popolo.

19 Kaj la Eternulo aperis al mi, respondante al miaj preĝoj, kaj diris al mi: Al via idaro mi donos ĉi tiun teron.

20 Kaj mi, Abraham, leviĝis de la loko de la altaro, kiun mi konstruis al la Eternulo, kaj de tie transloĝiĝis al la monto, kiu estas oriente de Bet-El, kaj aranĝis mian tendon tiamaniere, ke Bet-El estis okcidente kaj Aj oriente; kaj mi konstruis tie alian altaron al la Eternulo, kaj denove preĝadis al la Eternulo.

21 Kaj mi, Abraham, iris plue, ĉiam plue, al sudo; kaj ankoraŭ estis malsato en la lando; kaj mi, Abraham, decidis malsupreniri en Egiptujon, por tie loĝi kelktempe, ĉar malfacila fariĝis la malsato en la lando.

22 Kaj kiam mi estis jam proksime al Egiptujo, la Eternulo diris al mi: Saraj, via edzino, estas ja virino belaspekta;

23 Kaj kiam la egiptoj ŝin vidis, ili diros: Tio estas lia edzino; kaj ili mortigos vin, sed ŝin ili lasos viva; atentu do, ke vi agu jene:

24 Ŝi diru al la egiptoj, ke ŝi estas via fratino, kaj via animo restos viva.

25 Kaj okazis, ke mi, Abraham, diris al Saraj, mia edzino, ĉion, kion la Eternulo diris al mi: Diru do al ili, mi petegas al vi, ke vi estas mia fratino, por ke al mi estu bone pro vi kaj por ke mia animo restu viva pro vi.

### ĈAPITRO 3

KAJ mi, Abraham, havis la signojn de lumo kaj la signojn de justo, kiujn la Eternulo, mia Dio, donis al mi, en Ur la Ĥaldea;

2 Kaj mi vidis la stelojn; mi vidis, ke ili estas tre grandaj, kaj ke unu el ili estas plej proksime al la trono de Dio; kaj ke multaj grandaj steloj estas apud ĝi;

3 Kaj la Eternulo diris al mi: Ĉi tiuj estas la estroj; kaj la nomo de la granda stelo estas Kolob, ĉar ĝi estas proksime al mi, ĉar mi estas la Eternulo, via Dio: mi lokis ĉi tiun por estri ĉiujn, kiuj apartenas al la sama ordo, kiel tiu sur kiu vi staras.

4 Kaj la Eternulo diris al mi, per la signoj de lumo kaj la signoj de justo, ke Kolob estas laŭ la maniero de la Eternulo, laŭ siaj tempoj kaj sezonoj en siaj revoluo; ke unu revoluo estas unu tago por la Eternulo, laŭ lia kalkulmaniero, dum ĝi estas mil jaroj laŭ la tempo fiksita por la astro sur kiu vi staras. Tia estas la kalkulo de la tempo de la Eternulo, laŭ la kalkulo de Kolob.

5 Kaj la Eternulo diris al mi: La planedo, kiu estas la malpli granda lumaĵo, malpli ol tiu kiu regas la tagon, tio estas, tiu, kiu regas la nokton, estas supera aŭ pli granda laŭ kalkula vidpunkto ol tiu sur kiu vi staras, ĉar ĝi moviĝas en ordeco pli malrapida; tio estas en ordo, ĉar ĝi situas super la tero sur kiu vi staras, kaj sekve la kalkulo de ĝia tempo ne estas tiel multa laŭ tagnombro, kaj monatonombro, kaj jarnombro.

6 Kaj la Eternulo diris al mi: Nu, Abraham, ĉi tiuj du faktoj ekzistas, jen viaj okuloj vidas tion; estas donate al vi scii la

kalkultempojn, kaj la difinitan tempon, jes, la difinitan tempon de la tero sur kiu vi staras, kaj la difinitan tempon de la pli granda lumaĵo, kiu estas lokita por regi la tagon, kaj la difinitan tempon de la malpli granda lumaĵo, kiu estas lokita por regi la nokton.

7 Nu, la difinita tempo de la malpli granda lumaĵo estas pli longa tempo laŭ sia kalkulo ol la kalkulo de la tempo de la tero sur kiu vi staras.

8 Kaj kie ĉi tiuj du faktoj ekzistas, estos alia fakto super ili, tio estas, estos alia planedo, kies tempkalkulo estos eĉ pli longa;

9 Kaj tiamaniere oni kalkulos la tempon de unu planedo super alia ĝis oni alproksimiĝas al Kolob, kiu estas laŭ la tempkalkulo de la Eternulo; tiu Kolob estas lokita proksime al la trono de Dio por regi ĉiujn planedojn, kiuj apartenas al la sama ordo, kiel tiu sur kiu vi staras.

10 Kaj estas donate al vi scii la difinitan tempon de ĉiuj steloj, kiuj estas lokitaj por lumi, ĝis vi alproksimiĝos al la trono de Dio.

11 Tiel mi, Abraham, parolis kun la Eternulo, vizaĝon kontraŭ vizaĝo, kiel unu homo parolas kun alia; kaj li parolis al mi pri la ellaboraĵoj, kiujn liaj manoj faris;

12 Kaj li diris al mi: Mia filo, mia filo (kaj lia mano estis etendita), jen mi montros al vi ĉiujn ĉi. Kaj li metis sian manon sur miajn okulojn, kaj mi vidis tiujn aĵojn, kiujn liaj manoj faris, kaj ili estis multaj; kaj ili plimultiĝis antaŭ miaj okuloj, kaj mi ne povis vidi ilian finon.

13 Kaj li diris al mi: Tiu estas Ŝineha, kiu estas la suno. Kaj li diris al mi: Kolob, kiu signifas stelon. Kaj li diris al mi: Olia, kiu estas la luno. Kaj li diris al mi: Kokaŭbeam, kiu signifas stelojn, aŭ ĉiujn el la grandaj lumaĵoj, kiuj estas en la ĉiela firmaĵo.

14 Kaj estis nokto, kiam la Eternulo diris ĉi tiujn vortojn al mi: Mi multigos vin, kaj vian idaron post vi, simile kiel ĉi tiujn; kaj se vi povas kalkuli la nombron da sableroj, egalaj estos la nombro de viaj idoj.

15 Kaj la Eternulo diris al mi: Abraham, mi montras ĉi tiujn aferojn al vi

antaŭ ol vi iros en Egiptujon, por ke vi deklaru ĉiujn el ĉi tiuj vortoj.

16 Se du aĵoj ekzistas, kaj unu estas super la alia, pli grandaj aĵoj estos super ili; pro tio Kolob estas la plej granda el ĉiuj Kokaŭbeam, kiujn vi vidis, ĉar ĝi estas plej proksime al mi.

17 Do, se estas du aĵoj, unu super la alia, kaj la luno estas super la tero, tiam povas esti, ke planedo aŭ stelo eble ekzistas super ĝi; kaj ĉion, kion la Eternulo, via Dio, en sia koro decidis fari, li nepre faros.

18 Tamen, li faris la pli grandan stelon; kiel, plie, se estas du spiritoj, kaj unu estas pli inteligenta ol la alia, tamen ĉi tiuj du spiritoj, eĉ se unu estas pli inteligenta ol la alia, havas neniun komencon; ili ekzistis antaŭe, ili havos neniun finon, ili ekzistos poste, ĉar ili estas gnolaum, aŭ eternaj.

19 Kaj la Eternulo diris al mi: Ja ekzistas tiuj du faktoj, ke estas du spiritoj el kiuj unu estas pli inteligenta ol la alia; alia estos pli inteligenta ol ili; mi estas la Eternulo, via Dio, mi estas pli inteligenta ol ĉiuj el ili.

20 La Eternulo, via Dio, sendis sian anĝelon por liberigi vin el la manoj de la pastro de Elkena.

21 Mi loĝas inter ĉiuj el ili; mi nun, do, malsuprenvenis al vi por doni al vi la ellaboraĵojn, kiujn miaj manoj faris, en kiuj mia saĝo superas ĉiujn el ili, ĉar mi regas en la ĉielo supre, kaj sur la tero malsupre, per ĉia saĝo kaj prudento, super ĉiuj el la inteligentoj, kiujn viaj okuloj vidis de la komenco; mi malsuprenvenis en la komenco en la mezon de ĉiuj el la inteligentoj, kiujn vi vidis.

22 La Eternulo jam montris al mi, Abraham, la inteligentojn, kiuj estis organizitaj antaŭ ol la mondo ekzistis; kaj inter ĉiuj ĉi troviĝis multaj noblaj kaj grandaj;

23 Kaj Dio vidis ĉi tiujn animojn, kaj vidis, ke ili estas bonaj, kaj li staris meze de ili, kaj li diris: Ĉi tiujn mi faros miaj registroj; ĉar li staris inter tiuj, kiuj estis spiritoj, kaj li vidis, ke ili estas bonaj; kaj li diris al mi: Abraham, vi estas unu el ili; vi estis elektita antaŭ ol vi naskiĝis.

24 Kaj tie staris inter ili iu, kiu similis

al Dio, kaj li diris al tiuj, kiuj estis kun li: Ni malsupreniros, ĉar estas spaco tie, kaj ni prenos el ĉi tiuj materialoj, kaj ni faros teron, sur kiu ili povos loĝi.

25 Kaj ni provos ilin ĉi-maniere por konstati, ĉu ili faros ĉion, kion la Eternulo, ilia Dio, ordonos al ili;

26 Kaj tiuj, kiuj konservas sian unuan staton, ricevos aldonon; kaj tiuj, kiuj ne konservas sian unuan staton, ne havos gloron en la sama regno kun tiuj, kiuj konservas sian unuan staton; kaj tiuj, kiuj konservas sian duan staton, ricevos aldonon de gloro sur siaj kapoj por ĉiam kaj eterne.

27 Kaj la Eternulo diris: Kiun mi sendu? Kaj iu simila al la Filo de Homo respondis: Jen mi, sendu min. Kaj alia respondis kaj diris: Jen mi, sendu min. Kaj la Eternulo diris: Mi sendos la unuan.

28 Kaj la dua estis kolera, kaj ne konservis sian unuan staton; kaj tiutage multaj sekvis lin.

#### ĈAPITRO 4

KAJ tiam la Eternulo diris: Ni iru malsupren. Kaj ili iris malsupren je la komenco, kaj ili, tio estas la Dioj, organizis kaj formis la ĉielon kaj la teron.

2 Kaj la tero, post kiam ĝi estis formita, estis malplena kaj dezerta, ĉar ili formis nenion krom la tero; kaj mallumo regis super la abismo, kaj la Spirito de la Dioj ŝvebis super la akvo.

3 Kaj ili (la Dioj) diris: Estu lumo; kaj fariĝis lumo.

4 Kaj ili (la Dioj) konstatis la lumon, ĉar ĝi brilis; kaj ili apartigis la lumon, aŭ kaŭzis ĝian apartigon, de la mallumo.

5 Kaj la Dioj nomis la lumon Tago, kaj la mallumon ili nomis Nokto. Kaj okazis, ke la periodon de la vespero ĝis la mateno ili nomis nokto; kaj tiun de la mateno ĝis la vespero ili nomis tago; kaj estis la unua, aŭ la komenco, de tio, kion ili nomis tagnokto.

6 Kaj la Dioj diris ankaŭ: Estu spaco inter la akvo, kaj ĝi apartigu akvon de akvo.

7 Kaj la Dioj aranĝis la spacon tiel, ke

ĝi apartigis la akvon, kiu estis sub la spaco, de la akvo, kiu estis super la spaco; kaj fariĝis tiel, laŭ ilia aranĝo.

8 Kaj la Dioj nomis la spacon Ĉielo. Kaj okazis, ke la periodon de vespero ĝis mateno ili nomis nokto; kaj okazis, ke la periodon de mateno ĝis vespero ili nomis tago; kaj estis la dua fojo, ke ili nomis nokton kaj tagon.

9 Kaj la Dioj ordonis: Kolektiĝu la akvo de sub la ĉielo en unu lokon, kaj la tero leviĝu seka; kaj fariĝis tiel, kiel ili ordonis;

10 Kaj la Dioj nomis la sekan teron tero; kaj la kolektiĝojn de la akvo ili nomis grandaj akvoj; kaj la Dioj vidis, ke ili estas obeitaj.

11 Kaj la Dioj diris: Ni preparu la teron por kreskigi verdaĵon; herbon, kiu naskas semon; arbon, kiu donas frukton, laŭ sia speco, kies semo en ĝi mem donas ĝian bildon sur la tero; kaj fariĝis tiel, same kiel ili ordonis.

12 Kaj la Dioj organizis la teron por elkreskigi verdaĵon el ĝia semo, kaj la herbon por kreskigi el sia semo herbon, kiu donas semon laŭ sia speco; kaj la teron por elkreskigi el ĝia semo la arbon, kiu donas frukton, kies semo povas naski nur la saman en si mem, laŭ sia speco; kaj la Dioj vidis, ke ili estas obeitaj.

13 Kaj okazis, ke ili elnombris la tagojn; la periodon de la vespero ĝis la mateno ili nomis nokto; kaj la periodon de la mateno ĝis la vespero ili nomis tago; kaj estis la tria fojo.

14 Kaj la Dioj organizis la lumaĵojn en la ĉiela spaco, kaj igis ilin fari diferencon inter la tago kaj la nokto; kaj organizis ilin prezenti signojn kaj tempojn, tagojn kaj jarojn;

15 Kaj organizis ilin esti lumaĵoj en la ĉiela spaco por ke ili lumu sur la teron; kaj fariĝis tiel.

16 Kaj la Dioj organizis la du grandajn lumaĵojn, la pli grandan lumaĵon, por regi la tagon, kaj la malpli grandan lumaĵon, por regi la nokton; kun la malpli granda lumaĵo ili metis ankaŭ la stelojn;

17 Kaj la Dioj metis ilin sur la ĉiela

spaco, por ke ili lumu sur la teron, kaj por ke ili regu la tagon kaj la nokton, kaj por ke ili faru diferencon inter la lumo kaj la mallumo.

18 Kaj la Dioj observis tion, kion ili ordonis, ĝis ĝi plenumiĝis.

19 Kaj okazis, ke de vespero ĝis mateno estis nokto; kaj okazis, ke de mateno ĝis vespero estis tago; kaj estis la kvara fojo.

20 Kaj la Dioj diris: Ni preparu la akvon aperigi moviĝantaĵojn, vivajn estaĵojn; kaj birdojn, por ke ili ekflugu super la tero en la ĉiela spaco.

21 Kaj la Dioj preparis la akvon, por ke ĝi aperigu grandajn balenojn, kaj ĉiujn vivajn estaĵojn moviĝantajn, kiujn la akvo devis aperigi, laŭ ilia speco; kaj ĉiujn flugilhavajn birdojn laŭ ilia speco. Kaj la Dioj vidis, ke ili estas obeotaj, kaj ke ilia plano estas bona.

22 Kaj la Dioj diris: Ni ilin benos, kaj ilin fruktigos kaj multigos, kaj plenigos la akvon en la maroj aŭ grandaj akvoj; kaj multigos la birdojn sur la tero.

23 Kaj okazis, ke la periodon de vespero ĝis mateno ili nomis nokto; kaj okazis, ke la periodon de mateno ĝis vespero ili nomis tago; kaj estis la kvina fojo.

24 Kaj la Dioj preparis la teron por aperigi vivajn estaĵojn, laŭ ilia speco, brutojn kaj rampaĵojn, kaj surterajn bestojn, laŭ ilia speco; kaj fariĝis tiel, kiel ili diris.

25 Kaj la Dioj organizis la teron por aperigi la bestojn, laŭ ilia speco, kaj la brutojn, laŭ ilia speco, kaj ĉiujn rampaĵojn de la tero, laŭ ilia speco; kaj la Dioj vidis, ke ili obeos.

26 Kaj la Dioj interkonsiliĝis inter si kaj diris: Ni iru malsupren kaj formu homon laŭ nia bildo, similan al ni; kaj ni donos al li regon super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj de la ĉielo kaj super la brutoj, kaj super ĉiuj rampaĵoj, kiuj rampas sur la tero.

27 La Dioj do iris malsupren por organizi homon laŭ sia bildo, laŭ la bildo de la Dioj formi lin, en formo de viro kaj virino formi ilin.

28 Kaj la Dioj diris: Ni benos ilin. Kaj la Dioj diris: Ni ilin fruktigos kaj multigos por

plenigi la teron kaj submeti ĝin al si, kaj por regi super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj de la ĉielo, kaj super ĉiuj bestoj, kiuj moviĝas sur la tero.

29 Kaj la Dioj diris: Jen ni donos al ili ĉiujn herbojn, kiuj semas semon, kiuj venos sur la tuta tero, kaj ĉiujn arbojn, kiuj havos sur si frukton; jes, la arban frukton, kiu semas semon, al ili ni donos ĝin; ĝi estos por ili manĝaĵo.

30 Kaj al ĉiuj bestoj de la tero, kaj al ĉiuj birdoj de la ĉielo, kaj al ĉiuj rampaĵoj sur la tero, jen ni donos al ili vivon, kaj ni donos al ili ankaŭ la tutan verdan herbaĵon kiel manĝaĵon, kaj ĉio ĉi estos tiel organizata.

31 Kaj la Dioj diris: Ni faros ĉion, kion ni diris, kaj organizos tion; kaj jen ili estos tre obeemaj. Kaj okazis, ke la periodon de vespero ĝis mateno ili nomis nokto; kaj okazis, ke la periodon de mateno ĝis vespero ili nomis tago; kaj ili nombris la sesan fojon.

## ĈAPITRO 5

KAJ tiel ni finos la ĉielon kaj la teron kaj ĉiujn iliajn apartenaĵojn.

2 Kaj la Dioj diris inter si: Je la sepa fojo ni finos nian laboron, pri kiu ni interkonsiliĝis; kaj ni ripozos je la sepa fojo de la tuta laboro, pri kiu ni interkonsiliĝis.

3 Kaj la Dioj decidis je la sepa fojo pro tio, ke je la sepa fojo ili ripozos de la tuta laboro, kiun ili (la Dioj) interkonsiliĝis formi; kaj sanktigis ĝin. Kaj tiaj estis iliaj decidoj, kiam ili interkonsiliĝis inter si por formi la ĉielon kaj la teron.

4 Kaj la Dioj venis malsupren kaj formis ĉi tiujn naskojn de la ĉielo kaj tero, kiam ili estis formitaj, kiam la Dioj formis la teron kaj la ĉielon,

5 Laŭ ĉio, kion ili diris pri ĉiu kampa arbeto antaŭ ol ĝi estis sur la tero, kaj pri ĉiu kampa herbo antaŭ ol ĝi kreskis; ĉar la Dioj ankoraŭ ne pluvigis sur la teron kiam ili interkonsiliĝis fari ilin, kaj ankoraŭ ne formis homon por prilabori la teron.

6 Sed nebulo leviĝadis de la tero kaj donadis malsekecon al la tuta supraĵo de la

tero.

7 Kaj la Dioj formis la homon el polvo de la tero, kaj prenis lian spiriton (tio estas, la spiriton de la homo), kaj metis ĝin en lin; kaj enblovis en lian nazon spiron de vivo, kaj la homo fariĝis viva animo.

8 Kaj la Dioj plantis ĝardenon en Eden en la Oriento, kaj ili metis tien la homon, kies spiriton ili metis en la korpon, kiun ili formis.

9 Kaj la Dioj elkreskigis el la tero ĉiun arbon ĉarman por la vido kaj bonan por la manĝo, kaj la arbon de vivo en la mezo de la ĝardeno, kaj la arbon de sciado pri bono kaj malbono.

10 Rivero eliris el Eden, por akvoprovizi la ĝardenon, kaj de tie ĝi dividiĝis kaj fariĝis kvar ĉefpartoj.

11 Kaj la Dioj prenis la homon kaj enloĝigis lin en la ĝardeno Edena, por ke li prilaboradu ĝin kaj gardu ĝin.

12 Kaj la Dioj ordonis al la homo, dirante: De ĉiu arbo de la ĝardeno vi manĝu,

13 Sed de la arbo de sciado pri bono kaj malbono vi ne manĝu, ĉar en la tago, en kiu vi manĝos de ĝi, vi mortos. Nun mi, Abraham, vidis, ke tio estis post la tempo de la Eternulo, kiu estis post la tempo de Kolob; ĉar la Dioj ankoraŭ ne difinis por Adam lian kalkulon.

14 Kaj la Dioj diris: Ni kreu al la homo helpanton similan al li, ĉar ne estas bone, ke la homo estu sola; pro tio ni formos helpanton similan al li.

15 Kaj la Dioj faligis profundan dormon sur la homon; kaj ĉi tiu endormiĝis, kaj ili prenis unu el liaj ripoj kaj fermis la lokon per karno;

16 Kaj el la ripo, kiun la Dioj prenis de la homo, ili formis virinon, kaj venigis ŝin al la homo.

17 Kaj Adam diris: Jen ŝi estis osto el miaj ostoj kaj karno el mia karno; nun ŝi estu nomata Virino, ĉar el viro ŝi estas prenita;

18 Tial viro forlasos sian patron kaj sian patrinnon, kaj aliĝos al sia edzino, kaj ili estos unu karno.

19 Kaj ili ambaŭ estis nudaj, la homo kaj lia edzino, kaj ili ne hontis.

20 Kaj la Dioj formis el la tero ĉiujn bestojn de la kampo kaj ĉiujn birdojn de la ĉielo, kaj venigis ilin al la homo, por vidi, kiel li nomos ilin; kaj kiel la homo nomis ĉiun via estaĵon, tiel restis ĝia nomo.

21 Kaj la homo donis nomojn al ĉiuj brutoj kaj al la birdoj de la ĉielo kaj al ĉiuj bestoj de la kampo; kaj por la homo troviĝis helpanto simila al li.



FAKSIMILO EL LA LIBRO DE ABRAHAM

N-ro 1

KLARIGO DE LA GRAVURAĴO ĈI-SUPRA

- Fig. 1. La Anĝelo de la Eternulo.  
Fig. 2. Abraham ligita sur altaro.  
Fig. 3. La idolservanta pastro de Elkena, kiu provas buĉi Abrahamon kiel oferon.  
Fig. 4. La altaro por buĉoferado de la idolservantaj pastroj, starantaj antaŭ la dioj de Elkena, Libna, Maĥmakra, Koraŝ, kaj Faraono.  
Fig. 5. La idoldio de Elkena.  
Fig. 6. La idoldio de Libna.  
Fig. 7. La idoldio de Maĥmakra.  
Fig. 8. La idoldio de Koraŝ.  
Fig. 9. La idoldio de Faraono.  
Fig. 10. Abraham en Egiptujo.  
Fig. 11. Desegnitaj por reprezenti la kolonojn de la ĉielo, kiel la egiptoj supozis ilin.  
Fig. 12. Faŭkijang, kiu signifas spacon, aŭ la ĉielan firmaĵon super niaj kapoj; sed ĉi-kaze, rilate al ĉi tiu temo, la egiptoj volis doni al ĝi la signifon Ŝaŭmu, esti alta, aŭ la ĉielo, kiu interrespondas al la hebrea vorto Ŝaŭmajim.

FAKSIMILO EL LA LIBRO DE ABRAHAM

N-ro 2

## KLARIGO DE LA GRAVURAĴO ĈI-ANTAŬA

Fig. 1. Kolob, kiu signifas la unuan kreaĵon, plej proksiman al la ĉielejo, aŭ la loĝejo de Dio. Unua koncerne estradon, lasta koncerne mezuradon de la tempo. La mezurado estas laŭ ĉiela tempo, kiu ĉiela tempo signifas po unu tagon por ĉiu ulno. Unu tago en Kolob egalas al mil jaroj laŭ la mezuro de ĉi tiu tero, kiu estas nomita de la egiptoj a-o-e.

Fig. 2. Staras plej proksime al Kolob; nomita de la egiptoj Olibliŝ, kiu estas la plej proksima estra kreaĵo apud la ĉielejo aŭ la loko, kie Dio loĝas; ankaŭ tenanta la ŝlosilon de la potenco, rilatanta al aliaj planedoj; kiel rivelita de Dio al Abraham, dum li oferis dankoferon sur altaro, kiun li konstruis por la Eternulo.

Fig. 3. Celas reprezenti Dion, sidantan sur sia trono, vestitan per potenco kaj aŭtoritato; kun krono de eterna lumo sur lia kapo; reprezentas ankaŭ la grandajn Slosilvortojn de la Sankta Pastreco, kiel rivelitaj al Adam en la Ĝardeno Edena, kiel ankaŭ al Set, Noa, Melkicedek, Abraham, kaj ĉiuj, al kiuj la Pastreco estis rivelita.

Fig. 4. Interrespondas al la hebrea vorto Raŭkijang, kiu signifas spacon, aŭ la ĉielan firmaĵon; ankaŭ numeralo, kiu egipte signifas milon; interrespondas al la mezurado de la tempo de Olibliŝ, kiu egalas al Kolob en sia rivoluado kaj en sia mezurado de la tempo.

Fig. 5. Estas nomita egipte Eniŝ-go-on-doŝ; ankaŭ ĉi tiu estas unu el la estraj planedoj; la egiptoj diris, ke ĝi estas la Suno, kaj pruntas sian lumon de Kolob pere de Kae-e-vanraŝ, kiu estas la granda Ŝlosilo, aŭ, alivorte, la estra potenco, kiu estras dek kvin aliajn fiksitajn planedojn aŭ stelojn, kiel ankaŭ Floiz, aŭ la Lunon, la Teron kaj la Sunon en iliaj ĉiujaraj rivoluoj. Ĉi tiu planedo ricevas sian potencon pere de Kli-flos-is-es, aŭ Ha-ko-kaŭ-beam, la steloj reprezentataj per numeroj 22 kaj 23, kiuj ricevas lumon de la rivoluoj de Kolob.

Fig. 6. Reprezentis ĉi tiun teron en ĝiaj kvar sezonoj.

Fig. 7. Reprezentis Dion sidantan sur sia trono, rivelantan tra la ĉielo la grandajn Slosilvortojn de la Pastreco; kiel ankaŭ la signon de la Sankta Spirito al Abraham, en la formo de kolombo.

Fig. 8. Enhavas skribon, kiu ne povas esti rivelata al la mondo; sed estas akirebla en la Sankta Templo de Dio.

Fig. 9 Devus ne esti rivelata nuntempe.

Fig. 10. Ankaŭ.

Fig. 11. Ankaŭ. Se la mondo povos eltrovi la signifon de ĉi tiuj numeroj, fariĝu tiel. Amen.

Figuroj 12, 13, 14, 15, 16, 17, 18, 19, kaj 20, estos donataj en tempo elektota de la Eternulo.

La ĉi-supra traduko estas donita laŭmezure, kiel ni rajtas nuntempe doni.

FAKSIMILO EL LA LIBRO DE ABRAHAM

N-ro 3

## KLARIGO DE LA GRAVURAĴO ĈI-SUPRA

Fig. 1. Abraham sidanta sur la trono de Faraono, pro la respekta cedo de la reĝo, kun krono sur lia kapo, kiu reprezentas la Pastrecon, kiel emblemon de la granda Prezidenteco en la Ĉielo; kun la sceptron de justeco kaj juĝo en lia mano.

Fig. 2. La reĝo Faraono, kies nomo estas indikita per la hieroglifoj super lia kapo.

Fig. 3. Signifas Abrahamon en Egiptujo--referencas al Abraham, kiel priskribita en la naŭa numero de Times and Seasons (Tempoj kaj sezonoj). (Ankaŭ kiel donita en la unua faksimilo de ĉi tiu libro.)

Fig. 4. Princo de Faraono, reĝo de Egiptujo, kiel skribita super la mano.

Fig. 5. Ŝulem, unu el la ĉefaj servistoj de la reĝo, laŭ la skribsimboloj super lia mano.

Fig. 6. Olimla, sklavo apartenanta al la princo.

Abraham rezonas pri la principoj de la Astronomio, en la kortego de la reĝo.

Jozefo SMITH--Mateo

Tio estas la dudek-kvara ĉapitro de Mateo, ekde la lasta verso de la dudek-tria ĉapitro, laŭ la versio de Reĝo Jakobo.

Ĉar mi diras al vi: De nun vi ne vidos min kaj vi ne scios, ke mi estas tiu pri kiu estas skribite de la profetoj, ĝis vi diros: Estu benata tiu, kiu venas en la nomo de la Eternulo, en la nuboj de la ĉielo, kaj kun ĉiuj sanktaj anĝeloj kun li. Tiam liaj disĉiploj komprenis, ke li revenos sur la teron post kiam li estos glorata kaj kronita dekstre de Dio.

2 Kaj Jesuo, elirinte, ekforiris de la templo; kaj liaj disĉiploj venis al li, por aŭdi lin, dirante: Majstro, montru al ni pri la konstruaĵoj de la templo, kiel vi diris: Ili estos deĵetitaj, kaj lasitaj al vi dezertaj.

3 Sed li responde diris al ili: Ĉu vi ne vidas ĉion tion, kaj ĉu vi ne komprenas ilin? Vere mi diras al vi: Ne estos lasita ĉi tie, ĉe ĉi tiu templo, ŝtono sur ŝtono, kiu ne estos deĵetita.

4 Kaj Jesuo lasis ilin, kaj iris sur la monton Olivarban. Kaj dum li sidis sur la monto Olivarba, la disĉiploj venis aparte al li, dirante: Diru al ni, kiam tio estos, kion vi diris pri la pereado de la templo, kaj la judoj; kaj kio estas la signo de via alesto kaj de la maturiĝo de la mondaĝo, aŭ la detruo de la malbonuloj, kio estos la fino de la mondaĝo?

5 Kaj Jesuo, respondante, diris al ili: Gardu vin, ke neniu vin forlogu;

6 Ĉar multaj venos en mia nomo, dirante: Mi estas la Kristo; kaj ili forlogos multajn;

7 Tiam oni transdonos vin al afliktado, kaj mortigos vin; kaj vi estos malamataj de ĉiuj nacioj pro mia nomo;

8 Tiam multaj ofendiĝos, kaj perfidos unu la alian;

9 Kaj multaj falsaj profetoj leviĝos, kaj forlogos multajn;

10 Kaj pro la multobliĝo de malpieco, la amo de la plimulto malvarmiĝos;

11 Sed kiu restos firma kaj ne estos venkita, tiu estos savita

12 Kiam do vi vidos la abomenindaĵon de dezerteco, pri kiu estas dirita de la profeto Daniel, pri la detruo de Jerusalemo, tiam vi staru sur la sankta loko; la leganto komprenu.

13 Tiam tiuj, kiuj estas en Judujo, forkuru al la montoj;

14 Kiu estas sur la tegmento forkuru, kaj ne revenu, por preni ion el sia domo;

15 Kaj kiu estas sur la kampo, tiu ne revenu, por preni sian mantelon;

16 Sed ve al la gravedulinoj kaj al la suĉigantinoj en tiuj tagoj;

17 Tial preĝu al la Eternulo, ke via forkurado ne estu en vintro nek en sabato;

18 Ĉar tiam, en tiuj tagoj, estos granda aflikto al la judoj, kaj al la loĝantoj de Jerusalemo, kia ne estis antaŭe sendita al Izraelo, de Dio, de la komenco de ilia regno ĝis nun; nek iam estos ree sendita al Izraelo.

19 Ĉio, kio okazis al ili, estas nur la komenco de la suferoj, kiuj okazos al ili.

20 Kaj se tiuj tagoj ne estus mallongigitaj, neniu el ilia karno estus savita; sed pro la elektitoj, laŭ la interligo, tiuj tagoj estos mallongigitaj.

21 Jen tion ĉi mi diris al vi pri la judoj; kaj plie, post la aflikto de tiuj tagoj, kiu venos al Jerusalemo, se iu diros al vi: Jen ĉi tie la Kristo, aŭ: Tie; ne kedu lin;

22 Ĉar en tiuj tagoj ankaŭ leviĝos falsaj kristoj kaj falsaj profetoj kaj faros grandajn signojn kaj miraklojn, tiel ke ili forlogus, se eble, eĉ la elektitojn, kiuj estas la elektitoj laŭ la interligo.

23 Jen mi diras tion ĉi al vi pro la elektitoj; kaj vi ankaŭ aŭdos pri militoj kaj famoj de militoj; zorgu, ke vi ne maltrankviliĝu, ĉar ĉio, kion mi diris al vi, devos okazi; sed ankoraŭ ne estas la fino.

24 Jen mi antaŭdiris al vi;

25 Se oni do diros al vi: Jen li estas en la dezerto; ne eliru; aŭ: Jen li estas en sekretaj ĉambroj; ne kredu;

26 Ĉar kiel la lumo de la mateno venas el la oriento kaj montriĝas ĝis la okcidento, kaj kovras la tutan teron, tiel ankaŭ estos la alesto de la Filo de homo.

27 Kaj nun mi montros al vi parabolon. Jen, kie ajn estos la kadavro, tien kolektiĝos la agloj; tiel same miaj elektitoj kolektiĝos el la kvar anguloj de la tero.

28 Kaj ili aŭdos pri militoj kaj famoj de militoj.

29 Jen mi parolas pro mia elektito; ĉar leviĝos nacio kontraŭ nacion, kaj regno kontraŭ regnon; kaj estos malsatoj kaj pestoj kaj tertremoj en diversaj lokoj.

30 Kaj plie, pro la multobliĝo de malpieco, la amo de la plimulto malvarmiĝos; sed kiu ne estos venkita, tiu estos savita.

31 Kaj plie, ĉi tiu evangelio de la regno estos predikata tra la tuta mondo, kiel atesto al ĉiuj nacioj, kaj tiam venos la fino, aŭ la perejo de la malbonuloj;

32 Kaj plie, la abomenindaĵo de dezerteco, pri kiu estas dirite de la profeto Daniel, plenumiĝos.

33 Kaj tuj post la aflikto de tiuj tagoj la suno mallumiĝos, kaj la luno ne donos sian lumon, kaj la steloj falos el la ĉielo, kaj la potencoj de la ĉielo ŝanceliĝos.

34 Vere mi diras al vi: Ĉi tiu generacio, al kiu tio ĉi estos montrata, ne forpasos, ĝis plenumiĝos ĉio, kion mi diris al vi.

35 Kvankam la tagoj venos, kiam la ĉielo kaj la tero forpasos, tamen miaj vortoj ne forpasos, sed ĉio plenumiĝos.

36 Kaj, kiel mi antaŭdiris, post la aflikto de tiuj tagoj, kaj post la ŝanceliĝo de la potencoj de la ĉielo, tiam aperos sur la ĉielo la signo de la Filo de homo, kaj tiam ploros ĉiuj gentoj de la tero, kaj oni vidos la Filon de homo, venantan en la nuboj de la ĉielo kun potenco kaj granda gloro;

37 Kaj kiu trezorigos miajn vortojn, tiu ne estos trompita, ĉar la Filo de homo venos, kaj li elsendos siajn anĝelojn antaŭ sin kun la

granda sono de trumpeto, kaj ili kolektos liajn ceterajn elektitojn el la kvar ventoj, el limo ĝis limo de la ĉielo.

38 De la figarbo lernu ĝian parabolon: kiam ĝiaj branĉoj jam moliĝis kaj aperigas foliojn, tiam vi scias, ke la somero estas proksima;

39 Tiel same, miaj elektitoj, kiam ili vidos ĉion tion, tiam ili scios, ke li estas proksima, ĉe la pordoj;

40 Sed pri tiu tago kaj la horo scias neniu, eĉ ne la anĝeloj de Dio en la ĉielo, sed la Patro sola.

41 Sed kiel estis en la tagoj de Noa, tiel estos je la alesto de la Filo de homo;

42 Ĉar okazos al ili, kiel dum la tagoj, kiuj estis antaŭ la diluvo; ĉar ĝis la tago, kiam Noa eniris en la arkeon, oni manĝis kaj trinkis, edziĝis kaj edziniĝis;

43 Kaj oni ne eksciis, ĝis la diluvo venis kaj forprenis ĉiujn; tiel estos la alesto de la Filo de homo.

44 Tiam plenumiĝos tio, kio estas skribita, ke en la lastaj tagoj du estos sur kampo: unu estos prenita, kaj la alia lasita;

45 Du estos muelantaj apud muelilo: unu estos prenita, kaj la alia lasita;

46 Kaj kion mi diras al unu, tion mi diras al ĉiuj homoj: Tial viglu; ĉar vi ne scias, en kiu horo via Sinjoro venos.

47 Sed sciu tion, ke se la dommastro scius, en kiu gardoparto venos la ŝtelisto, li viglus kaj ne lasus sian domon trafosiĝi, sed li estus preta.

48 Tial vi ankaŭ estu pretaj; ĉar en horo, kiam vi ne atendas, la Filo de homo venas.

49 Kiu do estas la fidela kaj prudenta servisto, kiun la sinjoro starigis super siajn domanojn, por doni al ili nutraĵon ĝustatempe?

50 Feliĉa estas tiu servisto, kiun lia sinjoro, veninte, trovos tiel faranta; kaj vere mi diras al vi: Super sian tutan havon li starigos lin.

51 Sed se tiu malbona servisto diros en sia koro: Mia sinjoro malfruas;

52 Kaj komencos bati siajn

kunservistojn, kaj manĝi kaj trinki kun la drinkuloj,

53 La sinjoro de tiu servisto venos en tago, kiam li ne atendas, kaj en horo, kiam li ne scias.

54 Kaj distranĉos lin, kaj difinos lian parton kun la hipokrituloj; tie estos la plorado kaj la grincado de dentoj.

55 Kaj tiel venas la fino de la malbonuloj, laŭ la profetaĵo de Moseo, kiu diris; Ili estos ekstermitaj el la popolo; sed la maturiĝo de la mondaĝo ankoraŭ ne okazas, sed ĝi baldaŭ okazos.

Jozefo SMITH--Historio

### Ekstraktoj el la Historio de la Profeto Jozefo Smith

PRO la multaj famoj, kiujn cirkuligis malbonintencaj kaj intrigemaj personoj pri la leviĝo kaj progreso de la Eklezio de Jesuo Kristo de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj, per kiuj la raportintoj intencis, ke ĉiuj famoj kontraŭagu ĝian reputacion kiel Eklezio kaj ĝian progreson en la mondo, mi estas persvadita verki ĉi tiun historion por elerarigi la publikan opinion kaj por doni al ĉiuj serĉantoj de la vero la faktojn, kiel ili okazis, pri kaj mi kaj la Eklezio, laŭ tio, kiom mi posedas tiajn faktojn.

2 En ĉi tiu historio mi prezentos kun vero kaj pieco la diversajn okazojn pri ĉi tiu Eklezio, kiel ili okazis, aŭ kiel ili aktuale ekzistas, en la oka jaro post la fondo de la nomita Eklezio.

3 Mi naskiĝis en la jaro de nia Sinjoro mil okcent kvin, je la dudek-tria tago de decembro, en la urbeto Sharon (Ŝaron), distrikto Windsor (Vindsor), ŝtato Vermonto. . . . Mia Patro Joseph (Jozefo) Smith eliris el la ŝtato Vermonto, kaj transloĝiĝis al Palmyra (Palmira), distrikto Ontario (nun Wayne=Uyejn), ŝtato Nov-Jorka, kiam mi havis ĉirkaŭ dek jarojn. Ĉirkaŭ kvar jarojn post la alveno de mia patro en Palmyra, li transloĝiĝis kun sia familio al Manchester (Manĉester) en la sama distrikto Ontario.

4 Lia familio tiama konsistis el dek unu animoj, nome, mia patro Joseph Smith; mia patrino Lucy (Lucia) Smith, kies nomo antaŭ ŝia edziniĝo estis Mack (Mak), filino de Solomon (Salomono) Mack; miaj fratoj Alvin (kiu mortis la 19an de novembro 1824 en sia 27a jaro); Hyrum (Hajrum); mi mem; Samuel Harrison; William (Vilhelmo); Don Carlos (Karlos); kaj miaj fratinoj Sophronia (Sofronia); Catherine (Katarina); kaj Lucy (Lucia).

5 Iam en la dua jaro post nia transloĝiĝo al Manĉester, en la loko, kie ni

loĝis, okazis eksterordinara ekscitiĝo pri la temo religio. Ĝi komenciĝis ĉe la metodistoj, sed baldaŭ ĝeneraliĝis inter ĉiuj sektoj en tiu regiono de la lando. La tuta distrikto ja ŝajnis emociita de ĝi, kaj multege da homoj aliĝis al la diversaj religiaj partioj, kiuj kreis ne malmulte da agitiĝo kaj disiĝo inter la popolo; kelkaj kriis: "Jen ĉi tie!", kaj aliaj: "Jen tie!" Kelkaj argumentis por la metodista kredo, kelkaj por la presbiterianismo, kaj kelkaj por la baptistoj.

6 Ĉar, malgraŭ la granda amo, kiun la konvertitoj al tiuj diversaj kredoj esprimis tiam, kiam ili konvertiĝis, kaj malgraŭ la granda fervoro montrata de la respektivaj pastroj, kiuj aktive iniciatis kaj akcelis tiun eksterordinaran spektaklon de religia emocio, por ĉiun konverti, kiel ili emis nomi tion, sen zorgo al kiu sekto ili aliĝis; tamen, kiam la konvertitoj komencis adeptiĝi, kelkaj al unu partio kaj kelkaj al alia, oni vidis, ke la ŝajne bona volo de kaj la pastroj kaj la konvertitoj estis pli laŭdira ol reala; ĉar spektaklo de granda konfuzo kaj malbona volo sekvis, kun pastro argumentanta kontraŭ pastro, kaj konvertito kontraŭ konvertito; tiel ke la tuta bona volo, kiun ili sentis unu al la aliaj, se ili iam havis iom, tute perdiĝis en konflikto de vortoj kaj kontesto pri opinioj.

7 Mi tiam estis en mia dek-kvina jaro. La familio de mia patro fariĝis prozelitoj de la presbiterianismo, kaj kvar el ili aliĝis al tiu eklezio, nome, mia patrino Lucia; miaj fratoj Hajrum kaj Samuel Harrison; kaj mia fratino Sofronia.

8 Dum tiu tempo de granda ekscitiĝo mia menso dediĉiĝis al serioza meditado kaj multa maltrankvilo; sed, kvankam miaj sentoj estis profundaj kaj ofte korŝiraj, mi ankoraŭ tenis min aparta de ĉiuj el tiuj partioj, kvankam mi iris al iliaj diversaj kunvenoj tiom ofte, kiom okazo permesis. Kun paso de tempo mia menso iom inklinis al la metodista sekto, kaj mi sentis iom da deziro unuiĝi kun ili; sed tiel granda estis la konfuzo kaj konflikto inter la diversaj konfesioj, ke ne estis eble, ke persono tiel juna, kiel mi estis, kaj tiel nescia pri homoj kaj aferoj, sendube

konkludu, kiu pravas kaj kiu malpravas.

9 La kriado kaj tumulto estis tiel grandaj kaj senĉesaj, ke mia menso de tempo al tempo estis tre ekscitita. La presbiterianoj estis plej absolute kontraŭ la baptistoj kaj metodistoj, kaj uzis ĉiujn rimedojn kaj de racio kaj de sofistiko por pruvi iliajn erarojn aŭ almenaŭ pensigi la popolon, ke ili eraras. Aliflanke, la baptistoj kaj metodistoj siavice estis egale fervoraj, penante demonstri siajn proprajn dogmojn kaj refuti ĉiujn aliajn.

10 En la mezo de ĉi tiu milito de vortoj kaj tumulto de opinioj, mi ofte diris al mi mem: Kion oni faru? Kiu el ĉiuj ĉi partioj pravas; aŭ ĉu ili ĉiuj malpravas? Se iu el ili pravas, kiu estas ĝi, kaj kiel mi sciu tion?

11 Dum mi luktis kun la ekstremaj malfacilaĵoj kaŭzitaĵoj de la kontestado de ĉi tiuj partioj de religiuloj, mi iun tagon legis la kvinan version de la unua ĉapitro de la Epistolo de Jakobo: Se al iu el vi mankas saĝeco, li petu Dion, kiu donacas al ĉiuj malavare kaj ne riproĉas, kaj ĝi estos al li donata.

12 Neniam iu ajn peco de la Sankta Skribo venis al la koro de homo kun pli da potenco ol ĉi tiu peco venis al mia. Ĝi ŝajnis eniri kun granda forto en ĉiun senton de mia koro. Mi denove kaj denove pensis pri ĝi, sciante ke, se iu homo bezonas saĝecon de Dio, tiu homo certe estas mi; ĉar mi ne sciis, kiel agi, kaj mi neniam sciis, se mi ne povus havigi al mi pli da saĝeco ol mi tiam havis; ĉar la religiaj instruantoj de la diversaj sektoj tiel malsame interpretis la samajn pecojn de la Sankta Skribo, ke ili detruis ĉiun fidon, ke oni povas respondi demandon per sinturno al la Biblio.

13 Fine mi venis al la konkludo, ke aŭ mi devas resti en mallumo kaj konfuzo, aŭ mi devas fari tion, kion Jakobo konsilas, tio estas, peti Dion. Mi fine decidis "peti Dion", konkludinte ke, se li donacus saĝecon al tiuj al kiuj mankis saĝeco, kaj donacus malavare kaj ne riproĉas, mi povus provi tion.

14 Sekve, konforme al ĉi tiu mia decido peti Dion, mi izoligis min en arbareto por fari la provon. Estis matene en bela hela

tago, frue en la printempo de mil okcent dudek. La unuan fojon en mia vivo mi faris tiam provon, ĉar meze de mia maltrankvilo mi ĝis tiam neniam faris la provon voĉe preĝi.

15 Izolinte min en la loko, kien mi antaŭe decidis iri, rigardinte ĉirkaŭ mi, kaj vidante min sola, mi genuiĝis kaj ek esprimis la deziron de mia koro al Dio. Mi apenaŭ tion faris, kiam tuj min kaptis ia potenco, kiu tute regis min kaj tiel mirige influis min, ke mia lango estis ligita tiom, ke mi ne kapablis paroli. Densa mallumo ekĉirkaŭis min, kaj ŝajnis al mi dum iom da tempo, ke mia sorto fariĝas subita pere.

16 Sed, streĉante mian tutan forton por voki al Dio, ke Li savu min el la potenco de ĉi tiu malamiko, kiu kaptis min, kaj je la preciza momento, kiam mi estis falonta en malesperon kaj forlasonta min al pere--ne al fantazia pere, sed al la potenco de iu reala estaĵo el la nevidata mondo, kiu havis mirigan potencon, kiun mi neniam antaŭe sentis ĉe iu ajn estaĵo--precize je ĉi tiu momento de timo, mi vidis kolonon de lumo ekzakte super mia kapo, pli brilan ol la suno, kiu iom post iom malsupreniris ĝis ĝi falis sur min.

17 Tuj kiam ĝi aperis, mi trovis min savita for de la malamiko, kiu ĉirkaŭligis min. Kiam la lumo suriĝis sur min, mi vidis starantaj super mi en la aero du Estulojn, kies brilo kaj gloro estas nepriskribeblaj. Unu el ili parolis al mi, vokinte min laŭnome, kaj diris, montrante la alian al mi: Ĉi tiu estas Mia Filo, la amata. Aŭskultu lin!

18 Mia celo, kiam mi iris por demandi la Eternulon, estis ekscii, kiu el ĉiuj sektoj pravas, por ke mi sciu al kiu aliĝi. Sekve, kiam mi ekregis min sufiĉe por paroli, mi tuj demandis la Altrangulojn, kiuj staris super mi en la lumo, kiu el ĉiuj sektoj pravas, kaj al kiu mi aliĝu.

19 Mi ricevis respondon, ke mi aliĝu al neniuj el ili, ĉar ili ĉiuj malpravas; kaj la Altrangulo, kiu parolis al mi, diris, ke ĉiu el iliaj kredoj estas abomenindaĵo antaŭ Li: ke ĉiuj el ties doktoroj estas koruptitaj; ke "ili honoras Min per siaj lipoj, sed ilia koro estas malproksime de Mi; ili instruas kiel

doktrinojn ordonojn de homoj, havante ŝajnon de pieco, sed ili neas ĝian potencon."

20 Li denove malpermesis al mi aliĝi al iu ajn el ili; kaj multajn aferojn li diris al mi, kiujn mi nunmomente ne povas skribi. Kiam mi rekonsciiĝis, mi trovis min surdorse kuŝanta, rigardante supren al la ĉielo. Kiam la lumo foriris, mi estis senforta; sed, baldaŭ iom refortiĝinte, mi hejmeniris. Kaj pro tio, ke mi min apogis sur la kamenbreto, la patrino demandis, kio okazas al mi. Mi respondis, "Ne ĝenu vin, ĉio estas en ordo, mi sufiĉe bone fartas." Mi samtempe diris al mia patrino, "Mi mem eksciis, ke la presbiterianismo ne estas vera." Ŝajnas, ke la kontraŭulo konsciis, tre frue en mia vivo, ke mi estas destinita montriĝi ĝenanto de lia regno; kial alie la potencoj de mallumo unuiĝis kontraŭ mi? Kial okazis la kontraŭstarado kaj persekutado, kiuj leviĝis kontraŭ mi, preskaŭ en miaj infanaj jaroj?

21 Kelkajn tagojn post mia vizio, mi trovis min kun unu el la metodistaj predikantoj, kiu estis tre aktiva dum la antaŭe priskribita religia ekscitiĝo: kaj, parolante kun li pri la religio, mi uzis la okazon por rakonti al li pri la vizio, kiun mi havis. Lia konduto ege surprizis min; li traktis mian informon ne nur frivole, sed ankaŭ malestimege, dirante, ke tio venis de la diablo, ke vizioj aŭ revelacioj ne plu okazas; ke tiaj aferoj ĉesis kun la apostoloj, kaj ke ili neniam plu okazos.

22 Mi baldaŭ konstatis, tamen, ke mia rakontado incitis multe da malfavoro al mi inter doktoroj de religio, kaj kaŭzis persekutegon, kiu daŭre kreskis; kaj, kvankam mi estis nekonata knabo, kun nur inter dek kvar kaj dek kvin jaroj, kaj mia situacio en la vivo estis tia, kia farus knabon sen ia graveco en la mondo, tamen alte lokitaj viroj sufiĉe atentis, ke ili incitis la publikan opinion kontraŭ min, kaj kreis amaran persekutadon; kaj tio estis komuna inter ĉiuj sektoj: ĉiuj unuiĝis por persekuti min.

23 Tio serioze meditigis min tiam, kaj ofte poste, kiel strangege estas, ke nekonata knabo, nur iomete pli ol dekkvarjara, kaj, plie, knabo, kiu estis kondamnita al la neceso

perlabori siajn modestajn vivrimedojn, estis juĝata persono sufiĉe grava por altiri la atenton de la eminentuloj de la plej popularaj sektoj de tiuj tagoj, kaj tiomgrade, ke mi kreis ĉe ili spiriton de la plej amara persekutado kaj insultado. Sed strange aŭ ne, tio okazis, kaj tio estis ofte kaŭzo de granda aflikto al mi.

24 Tamen, mi fakte kaj efektive vidis vizion. Poste mi ofte pensis, ke mi sentis multsimile kiel Paŭlo, kiam li defendis sin antaŭ la reĝo Agripo, rakontante la vizion, kiun li havis, kiam li vidis lumon, kaj aŭdis voĉon; sed nur malmultaj homoj kredis lin; kelkaj diris, ke li estas malhonesta; aliaj diris, ke li frenezas; kaj oni mokis kaj insultis lin. Sed ĉio ĉi ne detruis la realecon de lia vizio. Li vidis vizion, li sciis, ke li vidis ĝin, kaj ĉia persekutado sub la ĉielo neniel povus ŝanĝi tion; kaj eĉ se oni persekutus lin ĝis la morto, tamen li sciis, kaj sciis ĝis sia plej lasta spiro, ke li kaj vidis lumon kaj aŭdis voĉon, kiu parolis al li, kaj la tuta mondo ne povus devigi lin pensi aŭ kredi alimaniere.

25 Same okazis al mi. Mi efektive vidis lumon, kaj en la mezo de tiu lumo mi vidis du Altrangulojn, kaj ili efektive parolis al mi; kaj, kvankam oni malamis kaj persekutadis min pro tio, ke mi diris, ke mi vidis vizion, tamen ĝi estis vera; kaj dum ili persekutus min, riproĉis min, kaj false min kalumniis pro tio, ke mi diris tion, mi estis direktita diri en mia koro: Kial oni persekutas min pro tio, ke mi diris la veron? Mi efektive vidis vizion; kaj kiu estas mi, ke mi rezistu Dion, kaj kial la mondo celas devigi min nei, kion mi efektive vidis? Ĉar mi vidis vizion; mi sciis tion, kaj mi sciis, ke Dio scias tion, kaj mi nek povis nei tion, nek kuraĝis tion fari: en ĉiu okazo mi sciis, ke, tion farante, mi ofendus Dion kaj estus kondamnata.

26 Mia menso estis jam kontenta rilate al la sektaro; ne estis mia devo aliĝi al iu ajn el ili, mia devo estis daŭrigi tiel, kiel mi estis, ĝis mi ricevos alian direkton. Mi trovis, ke la atesto de Jakobo estas vera: se al iu mankas saĝeco, li petu Dion, kaj ĝi estos al li donata, kaj Dio ne riproĉos.

27 Mi daŭrigis miajn kutimajn

okupojn en la vivo ĝis la dudek-unua de septembro, mil okcent dudek tri, la tutan tempon severe persekutate de ĉiaj homoj, kaj religiaj kaj nereligiaj, pro tio, ke mi asertadis, ke mi vidis vizion.

28 Dum la periodo, kiu pasis inter la momento, kiam mi vidis la vizion, kaj la jaro mil okcent dudek tri--malpermesite aliĝi al iu ajn el la religiaj sektoj de tiuj tagoj, kaj ne havante maturan aĝon, kaj persekutate de tiuj, kiuj devus esti miaj amikoj kaj devus bonkore trakti min, kaj kiuj, supozante min viktimo de iluzioj, devus dece kaj ameme min resanigi--oni lasis min senhelpa antaŭ ĉiaj tento; kaj, miksiĝante kun ĉiaj homoj, mi ofte falis en multajn malsaĝajn erarojn, kaj montris la malfortecon de la juneco, kaj la malfortaĵojn de la homa naturo; kio, mi bedaŭras diri, kondukis min en diversajn tentojn ofendajn al la okuloj de Dio. Kvankam mi tion konfesas, oni ne kredu min kulpa pri gravaj aŭ malutilaj pekoj. Emo fari tiajn pekojn neniam estis en mia naturo. Sed mi kulpis pri frivoleco, kaj kelkfoje akompanis gajajn kamaradojn, k.t.p., kio ne konformis al tiu karaktero, kiun devus konservi iu vokita de Dio, kiel mi. Sed tio ne ŝajnos tre stranga al iu, kiu memoras mian junecon, kaj kiu konas mian nature gajan temperamenton.

29 Pro tio ĉi mi ofte sentis min kondamnata pro mia malforteco kaj miaj neperfektaĵoj; sed vespere de la antaŭe citita malforteco kaj miaj neperfektaĵoj; sed vespere de la antaŭe citita dudek-unua de septembro, foririnte al mia lito por la nokto, mi ekpreĝis kaj petegis Dion la Plejpotencan, ke Li pardonu ĉiujn el miaj pekoj kaj frivolaĵoj, kaj ankaŭ ke Li manifestu ion al mi por ke mi sciu mian situacion kaj reputacion antaŭ Li; ĉar mi plene kredis, ke mi ricevos diecan manifeston, kiel jam antaŭe.

30 Dum mi do preĝis al Dio, mi rimarkis lumon, kiu aperis en mia ĉambro kaj kreskadis ĝis la ĉambro estis pli hela ol je la tagmezo, kaj individuo tuj aperis flanke de mia lito, starante en la aero, ĉar liaj piedoj ne tuŝis la plankon.

31 Li portis malstrikatan robon plej rave



belan. Ĝia blankeco superis ian surteraĵon, kiun mi iam vidis; kaj mi kredas, ke neniu surtera objekto povus aperi tiel treege blanka kaj brila. Liaj manoj estis nudaj, kaj ankaŭ liaj brakoj, iom super la manradikoj; simile, ankaŭ liaj piedoj estis nudaj, kiel liaj kruroj, iom super la maleoloj. Ankaŭ lia kapo kaj lia kolo estis nudaj. Mi povis rimarki, ke li portis neniun veston krom la robo, ĉar ĝi estis nefermita tiel, ke mi vidis lian bruston.

32 Ne nur lia robo estis treege blanka, sed lia tuta persona estis nepriskribeble belega, kaj lia vizaĝo estis vere kiel fulmo. La ĉambro estis treege hela, sed ne tiel brila kiel tute apud lia figuro. Kiam mi unue rigardis lin, mi timis; sed la timo baldaŭ eliris el mi.

33 Li laŭnome vokis min, kaj diris al mi, ke li estas mesaĝportanto sendita de antaŭ Dio al mi, kaj ke lia nomo estas Moroni; ke Dio havas taskon farotan de mi; kaj ke mia nomo estos konata por bono aŭ malbono inter ĉiuj popoloj, gentoj, kaj lingvoj, aŭ ke ĝi estos kaj bone kaj malbone preparolata inter ĉiuj homoj.

34 Li diris, ke ekzistas deponita libro, skribita sur oraj platoj, kiu donas kronikon pri la praloĝantoj de ĉi tiu [amerika (N.d.l.t.)] kontinento, kaj priskribon pri la fonto el kiu ili devenis. Li diris ankaŭ, ke troviĝas en ĝi la plena eterna Evangelio, kiun la Savanto donis al la praloĝantoj;

35 Plie, ke deponitaj kun la platoj estas du ŝtonoj en arĝentaj arkoj, kaj tiuj ŝtonoj fiksitaj al surbrustaĵo formas la signojn de lumo kaj de justo, kiujn oni nomis la Urimo kaj la Tumino; kaj la posedo kaj uzo de ĉi tiuj ŝtonoj estas tio, kio konstituis "viziistojn" kaj "antaŭvidistojn" en la tempo antikva aŭ antaŭa; kaj ke Dio preparis ilin por traduki la libron.

36 Dirinte ĉi tion al mi, li komencis citi la profetaĵojn de la Malnova Testamento. Li unue citis parton de la tria ĉapitro de Malaĥi; kaj li citis ankaŭ la kvaran aŭ lastan ĉapitron de la sama profetaĵo, kvankam kun eta varianto kompare al la teksto en niaj Bibliojoj. Anstataŭ citi la unuan verson tiel kiel ĝi troviĝas en niaj libroj, li citis ĝin jene:

37 Ĉar jen venos tago, ardanta kiel forno; tiam ĉiuj malhumiluloj kaj malboneguloj brulos kiel pajlo; ĉar la venontoj bruligos ilin, diras la Eternulo Cebaot, ke ĝi ne restigos al ili radikon nek branĉon.

38 Kaj plie, li citis la kvinan verson jen: Jen mi rivelacios al vi la Pastrecon, per la mano de la profeto Elija, antaŭ ol venos la granda kaj timinda tago de la Eternulo.

39 Li citis ankaŭ la sekvantan verson malsame: Kaj li plantos en la korojn de la infanoj la promesojn donitajn al la patroj, kaj la koroj de la infanoj turniĝos al iliaj patroj. Se tio ne fariĝus, la tuta tero estus tute ekstermota je lia veno.

40 Krom tiuj ĉi, li citis la dek-unuan ĉapitron de Jesaja, dirante, ke tiu estas tuj plenumota. Li citis ankaŭ la dudek-duan kaj dudek-trian versojn de la tria ĉapitro de La Agoj, precize kiel ili troviĝas en nia Nova Testamento. Li diris, ke tiu profeto estas Kristo; sed la tago ankoraŭ ne venis, kiam "tiuj, kiuj ne aŭskultos lian voĉon, ekstermiĝos el la popolo", sed ĝi baldaŭ venos.

41 Li citis ankaŭ la duan ĉapitron de Joel, de la dudek-oka verso ĝis la lasta. Li diris ankaŭ, ke tio ankoraŭ ne plenumiĝis, sed baldaŭ okazos. Kaj li plie deklaris, ke la pleneco de la nacioj baldaŭ envenos. Li citis multajn aliajn pecojn el la Sanktaj Skriboj, kaj donis multajn klarigojn, kiuj ne povas esti cititaj ĉi tie.

42 Plie, li diris al mi, ke, kiam mi havigos al mi tiujn platojn pri kiuj li parolis--ĉar la tempo por ilia havigo ankoraŭ ne plenumiĝis--mi ne montru ilin al iu ajn; nek la surbrustaĵon kun la signoj de lumo kaj de justo; nur al tiuj al kiuj mi estos ordonita montri ilin; se mi montrus ilin, mi estus detruita. Dum li parolis al mi pri la platoj, la vizio malfermiĝis al mia menso tiel ke mi vidis la lokon, kie la platoj estis deponitaj, kaj tiun tiel klare kaj distingeble, ke mi rekonis la lokon, kiam mi vizitis ĝin.

43 Post tiu komunikaĵo, mi vidis, ke la lumo en la ĉambro tuj komencis koncentriĝi ĉirkaŭ la figuro de tiu, kiu parolis al mi, kaj ĝi

daŭre tion faris ĝis la ĉambro denove mallumiĝis, krom apude ĉirkaŭ li; kiam mi tuj vidis, ke kvazaŭ-akvokondukilo malfermiĝis rekte supren ĝis la ĉielo, kaj li supreniris ĝis li tute malaperis, kaj la ĉambro estis lasita, kiel ĝi estis antaŭ ol tiu ĉieleca lumo aperis.

44 Mi kuŝis, pripensante la strangecon de la sceno, kaj miregante pri tio, kion tiu eksterordinara sendito diris al mi; kiam, dum mia meditado, mi subite rimarkis, ke mia ĉambro ree eklumiĝis, kaj ŝajne tuj la sama ĉiela sendito estis ĉe la flanko de mia lito.

45 Li ekparolis, kaj rediris la samajn vortojn, kiujn li diris dum sia unua vizito, sen la plej malgranda ŝanĝeto; post kio li informis min pri la grandaj punoj, kiuj venos sur la teron, kun grandaj dezertigoj per malsato, glavo kaj pesto; kaj ke tiuj pezaj punoj venos sur la teron en ĉi tiu generacio. Dirinte tion, li ree supreniris, kiel li antaŭe faris.

46 Jam tiel profundaj estis la efektoj faritaj al mia menso, ke la dormo jam fuĝis de miaj okuloj, kaj mi restis kuŝanta, subigite de mirego pri tio, kion mi kaj vidis kaj aŭdis. Sed kia estis mia surprizo, kiam mi denove vidis la saman senditon ĉe mia lito, kaj aŭdis lin reprezenti aŭ ripeti denove al mi la samajn aferojn kiel antaŭe; kaj li aldonis averton al mi, dirante al mi, ke Satano provos tenti min (pro la mizera stato de la familio de mia patro) havigi al mi la platojn kun la celo riĉiĝi. Tion li malpermesis al mi, dirante, ke mi devos havi neniun alian celon antaŭ mi ol havigi la platojn nur por glori Dion, kaj ke mi devos ne esti influata de iu alia motivo ol konstrui lian regnon; alie mi ne ricevos ilin.

47 Post tiu tria vizito, li ree supreniris en la ĉielon kiel antaŭe, kaj mi ree estis lasita por mediti pri la eksterordinareco de tio, kion mi ĵus spertis; ĝis preskaŭ tuj post la triafoja supreniro de la ĉiela sendito, koko kriis, kaj mi vidis, ke la tago alproksimiĝas kaj ke niaj interparoloj do okupis tiun tutan nokton.

48 Mi baldaŭ poste leviĝis de mia lito kaj, kiel kutime, iris al la necesaj taskoj de la tago; sed, provante labori kiel antaŭe, mi konstatis, ke mia forto estis tiel elĉerpita, ke mi fariĝis tute ne kapable tion fari. Mia patro,

kiu laboris apud mi, rimarkis, ke io stranga okazis al mi, kaj li diris, ke mi iru hejmen. Mi ekiris, intencante iri al la domo; sed, kiam mi provis transiri la palisaron ekster la kampon, kie ni estis, mia forto tute mankis al mi, kaj mi falis senpova sur la teron kaj dum iom da tempo estis tute senkonscia pri ĉio.

49 Post tio la unua afero, kiun mi memoras, estis voĉo, kiu parolis al mi, vokante min per mia nomo. Mi supren rigardis, kaj vidis la saman senditon staranta super mia kapo, ĉirkaŭata per lumo kiel antaŭe. Li denove diris al mi ĉion, kion li diris al mi en la antaŭa nokto, kaj li ordonis al mi, ke mi iru al mia patro kaj rakontu al li pri la vizio kaj ordonoj, kiujn mi ricevis.

50 Mi obeis; mi reiris al mia patro en la kampo, kaj ripetis ĉion al li. Li respondis al mi, ke tio venis de Dio, kaj li diris al mi, ke mi iru por fari, kion la sendito ordonis. Mi eliris el la kampo, kaj iris al la loko, kie laŭ tio, kion la sendito diris al mi, la platoj estis deponitaj; kaj pro la klareco de la vizio, kiun mi havis pri ĝi, mi tuj rekonis la lokon, kiam mi alvenis tien.

51 Ĉe la vilaĝo Manchester (Manĉester), en la distrikto Ontario, ŝtato Nov-Jorka, staras iom granda monteto, la plej alta el ĉiuj en la najbaraĵo. Sur la okcidenta flanko de ĉi tiu monteto, ne malproksime de la supro, sub iom granda ŝtono, kuŝis la platoj, deponitaj en ŝtona kesto. Tiu ŝtono estis dika kaj rondforma en la mezo sur la supra flanko, kaj malpli dika ĉe la randoj, tiel ke ĝia meza parto estis videbla super la grundo, sed la rando ĉirkaŭ ĝi estis kovrita de tero.

52 Forpreninte la teron, mi havigis al mi levilon, kiun mi ŝovis sub la randon de la ŝtono, kaj per malgranda klopodo mi levis ĝin. Mi rigardis internen, kaj jen mi ja vidis la platojn, la signojn de lumo kaj de justo, kaj la surbrustajon, kiel la sendito anoncis. La kesto, en kiu ili kuŝis, estis formita per kunsternado de ŝtonoj en ia cemento. Sur la fundo de la kesto du ŝtonoj estis transverse metitaj, kaj sur ĉi tiuj ŝtonoj kuŝis la platoj kaj kun ili la aliaj aĵoj.

53 Mi provis elpreni ilin, sed la

sendito malpermesis tion, kaj li denove informis min, ke la tempo por ilia elpreno ankoraŭ ne alvenis, kaj ke ĝi ne alvenos ĝis kvar jaroj post tiu dato; sed li diris al mi, ke mi venu al tiu loko precize unu jaron post tiu dato, kaj ke li renkontos min tie, kaj ke mi ripetu tion ĝis la momento venos por ekpreni la platojn.

54 Sekve, kiel ordonite, mi iris tien post ĉiu jaro, kaj ĉiufoje mi trovis la saman senditon tie, kaj ricevis instrukcion kaj informon de li dum ĉiu interparolo, pri tio kion la Eternulo faros kaj kiel lia regno funkcios dum la lastaj tagoj.

55 Pro tio, ke la rimedoj de mia patro estis tre limigitaj, ni devis labori per niaj manoj, ludonante nin potage aŭ alimaniere, kiam ni trovis okazon. Jen ni estis hejme, jen for, kaj per konstanta laboro ni sukcesis komforte vivi.

56 En la jaro 1824 granda aflikto trafis la familion de mia patro, kiam mia plej aĝa frato Alvin mortis. En la monato oktobro, 1825, mi dungigis min ĉe maljuna sinjoro nomita Josiah (Joŝija) Stoal, kiu loĝis en la distrikto Ĉenango, ŝtato Nov-Jorka. Li aŭdis famon pri arĝenta mino, kiun hispanoj malfermis en Harmony (Harmonio), distrikto Susquehanna (Suskehanna), ŝtato Pensilvanio; kaj antaŭ ol li dungis min, li fosadis por eventuale trovi la minon. Post kiam mi ekloĝis ĉe li, li irigis min kun la ceteraj dungitoj por fosi por la arĝenta mino, ĉe kiu mi laboradis preskaŭ unu monaton, sen sukceso en nia entrepreno, kaj fine mi persvadis la maljunan sinjoron, ke li ĉesu fosserĉi ĝin. De tio venis la tre diskonita rakonto, ke mi estis fosserĉisto por mono.

57 Dum mi tiamaniere laboris, mi estis pensionano ĉe S-ro Isaac Hale (Isaak Hejl) de tiu loko; tie mi ekkonis mian edzinon (lian filinon) Emma Hale. Je la 18a de januaro, 1827, ni geedziĝis dum mi ankoraŭ estis dungito de S-ro Stoal.

58 Pro tio ke mi ankoraŭ asertis, ke mi vidis vizion, persekutado sekvis min, kaj la familio de la patro de mia edzino tre kontraŭis al nia geedziĝo. Mi devis do iri kun ŝi al alia

loko; ni tial foriris kaj geedziĝis en la domo de Skviro Tarbill, en South Bainbridge (Suda Bejnabriĝ), distrikto Ĉenango, ŝtato Nov-Jorka. Tuj post mia edziĝo mi foriris de S-ro Stoal kaj iris al mia patro kaj laboris sur la kampoj ĉe li dum tiu sezono.

59 Finfine alvenis la momento por ricevi la platojn, la signojn de lumo kaj de justo, kaj la surbrustajon. Je la dudek-dua tago de septembro, mil okcent dudek sep, kiam mi kiel kutime post plia jaro iris al la loko, kie ili estis deponitaj, la sama ĉiela sendito transdonis ilin al mi kun la jena postulo: ke mi havu la respondecon pri ili; ke, se mi pro malatento aŭ ia neglekto mia perdis ilin, mi estus ekstermita; sed ke, se mi faros ĉiujn miajn penojn por konservi ilin ĝis li, la sendito, repostulos ilin, ili estos protektataj.

60 Mi baldaŭ konstatis la kialon, kial mi ricevis tiel rigorajn ordonojn sekure konservi ilin, kaj kial la sendito diris, ke post kiam mi faros tion, kio estas postulata de mi, li repetos ilin. Tuj kiam oni sciis, ke mi havas ilin, oni faris la plej energiajn klopodojn por preni ilin de mi. Por tiu celo oni provis ĉian ruzaĵon, kiun oni povis elpensi. La persekutado fariĝis pli amara kaj pli severa ol antaŭe, kaj multege da homoj gvatadis por preni ilin de mi, se eble. Sed per la saĝo de Dio, ili sekure restis en miaj manoj ĝis mi faris per ili tion, kio estis postulata de mi. Kiam laŭ la aranĝo la sendito repetis ilin, mi donis ilin al li; kaj li gardas ilin ĝis hodiaŭ, t.e. la dua tago de majo, mil okcent tridek ok.

61 Tamen la agitado ankoraŭ daŭris, kaj la famo per siaj mil langoj okupis sin la tutan tempon per cirkulado de mensogoj pri la familio de mia patro, kaj pri mi mem. Se mi ripetus milonon el ili, tio plenigus volumojn. La persekutado, tamen, fariĝis tiel netolerebla, ke mi estis devigita foriri de Manĉester kaj iri kun mia edzino al la distrikto Susquehanna (Suskehanna) en la ŝtato Pensilvanio. Preparante por nia ekiro, estante tre malriĉaj, kaj pro la tre peza persekutado kontraŭ ni senesperaj, ke ni iam ajn ne estos malriĉaj, en la mezo de nia afliktiĝo ni trovis amikon en sinjoro nomita Martin Harris, kiu venis al ni

kaj donacis al mi kvindek dolarojn por helpi nin dum nia vojaĝo. S-ro Harris loĝis en la subdistrikto Palmyra (Palmira), distrikto Wayne (Uyejn), en la ŝtato Nov-Jorka, kaj estis honorinda bienulo.

62 Per ĉi tiu oportuna helpo mi povis atingi la lokon en Pensilvanio, kiu estis nia celo; kaj tuj post mia alveno tien mi komencis kopii la hieroglifojn de la platoj. Mi kopiis iom grandan nombron el ili, kaj per la signoj de lumo kaj de justo mi tradukis kelkajn el ili. Tion mi faris inter la momento, kiam mi atingis la domon de la patro de mia edzino en la monato decembro, kaj la sekvanta februaro.

63 Je iu tago en tiu monato februaro la antaŭe citita S-ro Martin Harris venis al mia loĝejo, prenis la hieroglifojn, kiujn mi desegnis laŭ la platoj, kaj ekiris kun ili al la urbo Nov-Jorko. Por priskribi tion, kio okazis al li kaj la hieroglifoj, mi referenciĝas al lia propra raporto pri la okazaĵoj, kiel li rakontis ilin al mi post sia reveno, per la sekvantaj vortoj:

64 "Mi iris al la urbo Nov-Jorko, kaj montris la tradukitajn hieroglifojn, kune kun ilia traduko, al Profesoro Charles Anthon (Karolo Anton), sinjoro konata pro siaj literaturaj verkoj. Profesoro Anthon diris, ke la traduko estas ekzakta, multe pli ol iu ajn alia traduko el la egipta, kiun li vidis. Mi tiam montris al li tiujn, kiuj ankoraŭ ne estis tradukitaj, kaj li diris, ke ili estas egiptaj, kaldeaj, asiraj, kaj arabaj; kaj li diris, ke ili estas aŭtentikaj hieroglifoj kaj signoj. Li donis al mi ateston por atesti al la homoj de Palmyra, ke ili estas aŭtentikaj skribosignoj, kaj ke la traduko de tiuj, kiuj estas tradukitaj, estas ekzakta. Mi prenis la ateston kaj metis ĝin en mian poŝon, kaj estis forironta el la domo, kiam S-ro Anthon revokis min, kaj demandis al mi, kiel la junulo malkovris, ke oraj platoj estis en la loko, kie li trovis ilin. Mi respondis, ke anĝelo de Dio malkaŝis tion al li.

65 "Li tuj diris al mi, 'Montru tiun ateston al mi.' Mi obeeme prenis ĝin el mia poŝo kaj donis ĝin al li. Li prenis ĝin kaj disŝiris ĝin, dirante, ke nuntempe anĝeloj ne

estas spiritoj servantaj, kaj ke, se mi alportos la platojn al li, li tradukos ilin, Mi informis lin, ke parto de la platoj estas sigelita, kaj ke mi estis malpermesita alporti ilin. Li respondis, 'Mi ne povas legi sigelitan libron.' Mi foriris de li kaj iris al D-ro Mitchell (Miĉel), kiu konfirmis tion, kion Profesoro Anthon diris pri kaj la skribosignoj kaj la traduko."

. . . . .  
66 Je la 5a tago de aprilo, 1829, Oliver Cowdery (Kaŭdri), kiun mi neniam vidis antaŭ tiam, venis al mia domo. Li diris al mi, ke, instruite en la lernejo de la loko, kie mia patro loĝis, li fariĝis dumtempa pensionano ĉe mia patro, kiu sendis siajn infanojn al la lernejo. Dum li estis tie, la familio rakontis al li pri la cirkonstanco, ke mi ricevis la platojn. Li do venis al mi por pridemandi min.

67 Du tagojn post la alveno de S-ro Cowdery (t.e. la 7an de aprilo) mi komencis traduki la Libron de Mormon, kaj li komencis skribi anstataŭ mi.

68 Ni ankoraŭ tradukadis, kiam en la sekvanta monato (majo, 1829), ni iun tagon iris en arbareton por preĝi kaj por demandi al la Eternulo pri la bapto por la pardonado de pekoj, kies mencion ni trovis en la traduko de la platoj. Dum ni tion faris, preĝante kaj vokante al la Eternulo, sendito el la ĉielo malsupren venis en nubo el lumo kaj, metinte siajn manojn sur nin, li ordinis nin, dirante:

69 Al vi, miaj kunservantoj, en la nomo de la Mesio, mi donas la Pastrecon de Aaron, kiu tenas la ŝlosilojn de la servade de anĝeloj, kaj de la evangelio de pento, kaj de la bapto per mergo (enakvigo) por la pardonado de pekoj; kaj ĉi tio neniam estos reprenita de la tero ĝis la idoj de Levi denove alportos la donojn al la Eternulo kun pieco.

70 Li diris, ke la Aarona Pastraro ne havas la povon de surmetado de manoj por la donaco de la Sankta Spirito, sed ke tiu estos donata al ni poste; kaj li ordonis al ni, ke ni iru por esti baptata, kaj li donis al ni preskribon, ke mi baptu Oliveron Cowdery, kaj ke poste li baptu min.

71 Ni obee iris kaj baptiĝis. Unue mi baptis lin, kaj poste li baptis min; post tio mi metis miajn manojn sur lian kapon kaj starigis lin en la Aarona Pastraro, kaj poste li metis siajn manojn sur min kaj starigis min en la sama Pastraro, ĉar tio estis ordonita al ni.

72 La sendito, kiu ĉi-foje vizitis nin kaj donis ĉi tiun Pastrecon al ni, diris, ke lia nomo estas Johano, tiu sama kiu estas nomita Johano la Baptisto en la Nova Testamento, kaj ke li agas sub la direktado de Petro, Jakobo kaj Johano, kiuj tenas la ŝlosilojn de la Pastraro de Melkicedek, kies Pastreco, li diris, estos siatempe donata al ni, kaj ke oni nomos min la unua Eldero (Ĉefo) de la Eklezio kaj lin (Oliver Cowdery) la dua. La dek-kvina tago de majo, 1829, estis la tago, kiam ni estis ordinitaj per la mano de ĉi tiu sendito, kaj baptitaj.

73 Tuj post kiam ni supren venis el la akvo post nia baptiĝo, ni spertis grandajn kaj glorajn benojn de nia Ĉiela Patro. Mi ĵus baptis Oliveron Cowdery, kiam la Sankta Spirito falis sur lin, kaj li ekstaris kaj profetis multon, kiu baldaŭ okazos. Kaj same, tuj post kiam li baptis min, ankaŭ mi ricevis la spiriton de profetado, kiam, ekstarinte, mi profetis pri la leviĝo de ĉi tiu Eklezio, kaj pri multaj aliaj aferoj, kiuj rilatas al la Eklezio, kaj pri ĉi tiu generacio de la homidoj. La Sankta Spirito plenigis nin, kaj ni ĝojis pri la Dio de nia savo.

74 Kun niaj mensoj jam klerigitaj, ni komencis plene kompreni la Sanktajn Skribojn, kaj la vera signifo kaj celo de iliaj pli misteraj pecoj malkaŝiĝis al ni laŭ maniero, kiun ni nek antaŭe atingis, nek antaŭe supozis ebla. Intertempe ni devis sekreti pri tio, ke ni ricevis la Pastrecon kaj estis baptitaj, pro persekutada fervoro, kiu jam montriĝis en la najbaraĵo.

75 Nin minacis, de tempo al tempo, atakoj de la popolaĉo, kaj ankaŭ de religiaj pretendantoj. Kaj kontraŭagis iliajn intencojn ataki nin nur la influo de la familianoj de la patro de mia edzino (pro Dia providenco), kiuj tre amikiĝis al mi, kaj kiuj kontraŭis la popolaĉon, kaj volis, ke mi estu permesita

daŭrigi la tradukadon sen interrompoj; kaj kiuj tial proponis kaj promesis al ni protektadon laŭ sia eblo kontraŭ ĉiuj neleĝaj agoj.

Oliver Cowdery jene priskribis ĉi tiujn okazaĵojn: Tiuj estis tagoj neniam forgesotaj--sidi sub la sono de voĉo, kiu diktis per la inspiro de la ĉielo, vekis la plejan dankemon en ĉi tiu sino! Tagon post tago mi seninterrompe el lia buŝo skribadis dum li tradukis per la signoj de lumo kaj de justo, aŭ, kiel la Nifaidoj dirus, 'Interpretiloj', la historion aŭ kronikon nomitan 'La Libro de Mormon'.

"Mencii, per eĉ malmultaj vortoj, la interesan raporton donitan de Mormon kaj lia fidela filo, Moroni, pri popolo iam amita kaj favorita de la ĉielo, anstataŭus mian nunan intencon; mi do prokrastos tion ĝis estonta tempo kaj, kiel mi diris en la enkonduko, mi pli rekte iros al kelkaj malmultaj incidentoj intime kunigitaj kun la leviĝo de ĉi tiu Eklezio, kiuj povus plaĉi al tiuj miloj, kiuj meze de la severaj grimacoj de bigotoj kaj la kalumnio de hipokrituloj antaŭen paŝis kaj ekpraktikis la Evangelion de Kristo.

"Neniu homo posedanta sobran prudenton povus traduki kaj skribi la direktivojn donitajn al la Nifaidoj el la buŝo de la Savanto pri la preciza maniero konstrui Lian Eklezion, precipe kiam la korupteco disvastigis necertecon pri ĉiuj formoj kaj sistemoj uzataj inter la homoj, sen deziri la privilegion montri la fervoron de sia koro per superkovriĝo en likva tombo, por respondi al 'la demando de bona konscienco per la releviĝo de Jesuo Kristo'.

"Post skribo de la raporto pri la servado de la Savanto al la restintoj el la idaro de Jakob, sur ĉi tiu kontinento [Ameriko (N.d.l.t.)], estis facile videble, kiel la profeto antaŭdiris, ke mallumo kovris la teron kaj krepusko la mensojn de la popolo. Post plua meditado estis facile videble, ke inter la konflikto kaj bruo pri la religio, neniu havis aŭtoritaton de Dio administri la regulojn de la Evangelio. Oni ja povus demandi: ĉu homoj, kiuj neas revelaciojn, havas aŭtoritaton

administri en la nomo de Kristo, kiam Lia atesto ne estas malpli ol la spirito de profetado, kaj Lia religio estas bazita, konstruita kaj apogita per rektaj revelacioj, en ĉiuj epokoj de la mondo dum kiuj Li havis popolon sur la tero? Se ĉi tiuj faktoj estis malaperigitaj kaj zorge kaŝitaj de homoj, kies profesio estus endanĝerigita se oni permesus, ke la faktoj brilu antaŭ la vizaĝoj de la homoj, ili jam ne estis kaŝitaj al ni; kaj ni atendis nur ĝis la ordono estis donita: 'Leviĝu, kaj baptiĝu'.

"Tio realiĝis baldaŭ post la ekdeziro. La Eternulo, kiu estas riĉa en kompateco, kaj ĉiam preta respondi al la konstanta preĝado de la humiluloj, post kiam ni fervore alpreĝis Lin, for de homaj loĝejoj, indulge montris al ni Sian volon. Subite, kvazaŭ el la mezo de la eterneco, la voĉo de la Savanto parolis pacon al ni. La vualo disiĝis kaj la anĝelo de Dio malsupren venis, vestita de gloro, kaj transdonis la ege atenditan mesaĝon kaj la ŝlosilojn de la Evangelio de pento. Kia ĝojo! kia mirindaĵo! kia mirego! Dum la mondo estis turmentata kaj konfuzata, dum milionoj palpe serĉis, kiel blinduloj, kiuj serĉas muron, kaj dum la ĝenerala parto de la homoj restis en necerteco, niaj okuloj vidis, niaj oreloj aŭdis, kvazaŭ en brilega taglumo; jes, eĉ pli--super la trema lumo de la maja sunradio, kiu tiam verŝis sian brilecon sur la tutan naturajon. Tiam lia voĉo, kvankam milda, penetris al la kerno, kaj liaj vortoj, 'Mi estas via kunservanto', dispelis ĉiun timon. Ni aŭskultis, ni fikse rigardis, ni admiris! Tio estis la voĉo de anĝelo, de gloro, tio estis mesaĝo de la Plejaltulo! Kaj, aŭdante, ni ĝojis dum Lia amo ekbrulis en niaj animoj, kaj la vizio de la Plejpotenculo envolvis nin! Kie estis loko por dubo? Nenie; necerteco forflugis, dubo malleviĝis por neniam plu releviĝi, dum malvero kaj trompo por ĉiam forfuĝis!

"Sed, kara frato, imagu, imagu dum momento, kia ĝojo plenigis niajn korojn, kaj kun kia surpriziĝo ni ja genuiĝis, (ĉar kiu ne faldus la genuon por tia beno?), kiam ni ricevis sub lia mano la Sanktan Pastrecon dum

li diris, 'Al vi, miaj kunservantoj, en la nomo de la Mesio, mi donas ĉi tiun Pastrecon kaj ĉi tiun aŭtoritaton, kiu restos sur la tero, por ke la Idoj de Levi alportu la donojn al la Eternulo kun pieco!'

"Mi ne provos bildigi al vi la sentojn de ĉi tiu koro, nek la majestajn belecon kaj gloron, kiuj ĉirkaŭis nin tiukaze; sed vi kredos min, kiam mi diras, ke nek la tero, nek la homoj, per la elokventeco de la nuntempo, povas komenci vesti lingvon laŭ tiel interesa kaj sublimes maniero kiel tiu sankta gravulo. Ne; kaj ĉi tiu tero ne havas la povon doni la ĝojon, disdoni la pacon, aŭ kompreni la saĝon, kiun enhavis ĉiu frazo eldirita per la potenco de la Sankta Spirito! Homo povas trompi siajn kunhomojn, trompo povas sekvi trompon, kaj la infanoj de la malbonulo povas erarigi malsaĝulojn kaj malklerulojn, ĝis nur malvero nutras la popolamason, kaj la fruktoj de mensogo portas frivolulojn en sia fluo al la tombo; sed unu tuŝo per la fingro de lia amo, jes, unu radio de gloro el la supra mondo, aŭ unu vorto el la buŝo de la Savanto, el la sino de la eterneco, neniigas ĉion ĉi, kaj forviŝas ĝin el la menso por ĉiam. La certigo, ke ni estis en la ĉeesto de anĝelo, la certeco, ke ni aŭdis la voĉon de Jesuo, kaj la nemakulita vero, fluanta de pura gravulo, diktata laŭ la volo de Dio, ne estas priskribebla de mi, kaj mi ĉiam konsideros tiun esprimon de la boneco de la Savanto kun mirego kaj dankemo dum mi estos permesata resti; kaj en tiuj loĝejoj, kie perfekteco loĝas kaj kien peko neniam venas, mi esperas adoradi en tiu tago, kiu neniam ĉesos."--Times and Seasons (Tempoj kaj sezonoj), vol. 2, p. 201.

